

1974 septembro

67-a jaro

n-ro 825 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Hamburgo : Generaciaj ŝanĝoj

Vi trovos

tiun ĉi numeron de la revuo komplete dediĉita al la 59a Universala Kongreso de Esperanto. Ankaŭ ĉi-foje ni denove spertis, ke estas frenezige malfacile en unu solan numeron de la revuo enŝtopi la tutsemajnan kongresan evoluon, des pli kiam temas pri kongresoj, kiuj havas tempestajn trajtojn kiel la hamburga. Ni malcelis produkti dolĉan numeron pri la amaraj okazintaĵoj en la 59a UK, kredante, ke ni ĝuste tiamaniere proksimiĝos al realeca kongresbildo. Estas tre probable, ke pluraj niaj konkludoj pri hamburgaj eventoj montriĝos eraraj, kion oni bonvole kreditu al la fakto, ke ni devis verki la sekvantajn raportojn tuj post la Kongreso, ne havante tempon atendi ĝis la polvo surteriĝu, ĝis la tempesta maro ĉesu ŝaŭmi.

Enhavo

- 141 Okaze de la eksigo de prof. d-ro Ivo Lapenna: La pludono de la torĉo
- 142 Rezolucio 3
- 143 Rezolucio 2, Kun estimo kaj sincera danko (Humphrey Tonkin)
- 144 La Solena Inaŭguro de la 59a UK: Impona reprezentiĝo
- 145 Rezolucio 1
- 146 Festparolado de prof. d-ro Ivo Lapenna (Fragmento): Trovi la necesan kuraĝon
- 147 Solena Fermo de la 59a UK: Neŭtraleco estas kaj restos la ĝusta vojo
- 148 Komitataj kaj estraraj kunsidoj: La komitata neefikeco
- 149 Internacia Somera Universitato: Granda interesiĝo, Nova elekto "B"
- 150 Laboraj sesioj de la Kongreso: Nekonvena etoso
- 151 Germana Vespero: Disciplino kiel artista virto (sm)
- 152 Teatro: Ĝuebla klasikaĵo (S. Milojević)
- 153 Eksterprograma teatra prezentaĵo: Familia sofo (E. Lapenna), Festaj aranĝoj
- 154 Internacia Arta Vespero: Bona koncerto
- 155 Belarta kaj Oratora konkursoj: Kolbaso sen mustardo, Trista evoluo
- 156 Fakaj kunvenoj dum la 59a UK: Kunvenoj por ĉies gusto, Satelitaj aranĝoj
- 157 Junulara Tago en Hamburgo: Nur laŭnome junulara, Seminario "Lingvo kaj socio": KER estas modelo
- 158 La 30a Internacia Junulara Konferenco en Münster: Bonege improvizita
- 159 Kunsidoj de la Komitato de TEJO en Münster: Sen drameco
- 160 Kongreseroj ...

La kovrilo

La dinamisma mondhaveno Hamburgo estis konvena scenejo por la dinamismo, kiu karakterizis la 59an Universalan Kongreson de Esperanto. En la hamburga haveno, post pluraj jardekoj de plurilate glora navigo, albordiĝis la malnova merita generacio de prof. d-ro Ivo Lapenna (supre sur la kovrilo). De la hamburga haveno, survoje al la vasta maro de novaj bataloj, ekstaris la nova, junece ambicia generacio, kun d-ro Humphrey Tonkin (sube sur la kovrilo) kiel nova prezidanto de Universala Esperanto-Asocio.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: S. Milojević.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,—gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonctarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam-3002, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA)

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne, PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germ., tel. (040) 7 38 45 08.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegujo; tel. (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B 3581 Achel, Belgio; tel. (011) 64 31 50.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B 4000 Liège, Belgio; tel. (041) 27 00 79.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino Flora Szabó-Felső, Várady A.út., H-7621 Pécs, Hungario.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Raławicka 10m. 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 74 12.

La pludono de la torĉo

LA KULMINO de la 59a Universala Kongreso de Esperanto okazis jam en la Solena Inaŭguro, la 27an de julio, kiam en sia Festparolado la ĝisnuna prezidanto de UEA prof. d-ro Ivo Lapenna deklaris sian eksigon el ĉiuj funkcioj en Universala Esperanto-Asocio. Tiu deklaro, eldirita digne kaj solene, stampis la tutan kongresan semajnon, samkiel la agado de Lapenna markis la tutan postmilitan evoluon de la Esperanto-movado ĝenerale, kaj de UEA aparte.



La decido pri la transdono de la taskoj ne estis facila: Prof. d-ro Ivo Lapenna post la anonco de sia eksigo.

Dum la kongresa semajno en Hamburgo, multaj homoj emis en la eksigo de Lapenna vidi historian eventon, epokfaran decidon, donante tiel nerealajn dimensiojn al la propre elektita fizika foriro de la plej kompleta gvidanto, kiun la Esperanto-movado konis en sia historio. Tamen, tiel ne estas, nek estos. Lapenna foriris — ĉar li mem tiel volis —, sed la epoko de Lapenna ne finiĝis: la ĝenerala gvidlinio de UEA restas tiu, kiun difinis ĝuste Lapenna mem.

La eksigo de Lapenna por plimulto de la partoprenintoj en la 59a UK estis surpriza, dolora eĉ por tiuj, kiuj opiniis necesa la transdonon de la gvida funkcio en la Asocio. Temis pri tiu historie necesa momento kiam oni konscie rezignas pri la pluaj servoj de la plej valora membro de la gvida teamo, tiamaniere nur anticipante la postan skuon, kiun la tempofluo ne-

eviteble kaj ĉiukaze portas kun si. En normalaj cirkonstancoj, tiaj transigoj devus esti sendoloraj, kvankam tiuj normalaj cirkonstancoj ne aperas ofte, nek Hamburgo estis escepto tiurilate.

Kiam temas pri la atmosfero, kiu rilate la transigon de la gvida rolo en la Movado regis en Hamburgo, necesas atentigi, ke la ĉeftraĵoj de tiu atmosfero klare konturiĝis jam longe antaŭ Hamburgo, eĉ longe antaŭ tiu fatala aprila ĉefartikolo, kiu ne plu spegulis tiun Lapenna al kiu ni dediĉas ĉi tiun artikolon. Malgraŭ tio, ke estas maleble eĉ provi jam nun objekte juĝi la hamburgajn okazintaĵojn, tiu damne tikla demando ne estas prisilentebla kaj jen — ni riskas ĝin tuŝi.


Ekster ĉiuj duboj, Ivo Lapenna estas la plej granda figuro, kiu sur la organiza kampo aktivis en la ĝisnuna historio de la Esperanto-movado. La giganta personeco de Lapenna, kiel lin prave titolis d-ro Tonkin en la Solena Fermo de la 59a UK, kunfandis en dinamisma simbiozo la idealismon de Zamenhof, la organizan talenton de Hodler kaj la oratoran kapablon kaj erudicion de Privat. Havante tiajn eksterordinarajn traĵojn, Lapenna per ili povis profitigi la Movadon pli longtempe ol kiu ajn antaŭa gvidanto.

Ne estas troigo aserti, ke ĉiuj gravaj iniciatoj kaj atingoj de la Esperanto-movado post la Dua mondmilito estas pli aŭ malpli rekte la merito de Ivo Lapenna: la finsolvo de la organiza dueco inter IEL kaj UEA, la akcepto de demokrata statuto, la fondo de CED, la starigo de ISU, la instalado de KKS, la havigo de domo por la CO de UEA, la sekciigo de TEJO, la vastigo de la karaktero de la UK, la ekaperigo de LMLP La atingo en Montevideo, en 1954, estis frua frukto de la konstanta strebado de Lapenna transformi UEA en kulturen organizaĵon, batalantan por la solvo de unu el la pli gravaj mondaj problemoj — la lingva. La rekono fare de Unesko siavice inspiris UEA plue moviĝi sur la vojo longe apenaŭ priatentata de aliaj internaciaj organizaĵoj, — tiu de batalo kontraŭ lingva kaj kultura imperiismo.

Al la fakuleco de Ivo Lapenna, pri diplomatio kaj internacia juro, oni ŝuldas la fruan postmilitan eltrovon de la realeca formulo, kiu en la internacia kadro difinas UEA kiel movadon forte ligitan al la idealoj proklamitaj de Unuiĝintaj Nacioj: jam meze de 1947 (proksimume unu kaj duonan jaron antaŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj) al la Statuto de UEA Lapenna aldonigis alineon, laŭ kiu “la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo”. Ankaŭ la principo de neŭtraleco en ĝia nuna formo, komprenata kiel ŝirmilo por gardi la sendependecon de UEA

kontraŭ difinitaj ideologioj kaj sociaj movadoj, ŝuldiĝas al la diplomataj kvalifikoj de Lapenna.

Dum sia 46 jarojn longa, senprecedence vigla aktiveco en la Esperanto-movado, unue kiel gvidanto de loka kaj landa organizaĵoj, kaj depost 1937 kiel komitatano, estrarano (ekde 1938), ĝenerala sekretario (1955-1964) kaj prezidanto (1964-1974) de UEA, Lapenna havis unu organizan ĉefcelon: establi la Esperanto-movadon antaŭ la okuloj de la ekstera mondo kiel seriozan, tutmonde atentindan movadon. Li bone konsciis, ke tion atingi ne eblis nur per deklaroj direktitaj al Unesko, sed, ke la necesa premiso por la efikeco de tiaspeca argumentado estas la edukado de la membraro. Ĝuste tial la plimulto de la publikaj elpaŝoj de Lapenna konsistis el organizaj lecionoj, mobilizaj artikoloj, alvokoj, avertoj, admonoj. Li senŝancele pledis por likvido de ĉiuj eksteraj signoj de interna entuziasmo, kiuj minacis stampi la Movadon kiel sektecan. Estis lia deziro transformi la heterogenan konglomeraton de la “esperantistaro” en disciplinitan movadon, kies devizo devus esti “Unueco super ĉio”. La Principaro de Frostavallen — plia verko de Lapenna — celis konsciigi al la esperantistoj, kiomgrade ili mem — neintence — riskis malhelpi la progreson de Esperanto. Kvankam tiurilate multaj obstakloj devis esti venkitaj — tro multaj kroĉis sin al la erara kredo, ke samideaneco identas kun solidareco —, ni hodiaŭ povas konstati, ke nelaste dank’al la senlaca insistado de Lapenna, la publika bildo de la esperantistoj konsiderinde serioziĝis, kion oni bele rimarkas ĝuste dum la Universalaj Kongresoj.



En la Solena Inaŭguro montriĝis, ke la plimulto estis surprizita per la decido de la ĝisnuna prezidanto.

Aliflanke, la eksterseria forto de la personeco de Lapenna neeviteble kondukis al alispeca dispartigo de la esperantistoj — en simpatiantojn kaj kontraŭulojn de Lapenna. Tiu polarizo de la Movado atingis sian kulminon en Hamburgo kaj — kiel evidentis en la unua duono de ĉi tiu jaro — minacis superregi ĉiujn aliajn demandojn kaj konsiderojn, transformigante el akcesora en la ĉefan temon de la Movado. Ĉio ĉi verŝajne, almenaŭ parte, estis sekvo de la radikala sanigo al kiu Lapenna submetis la Movadon. Lia klopodo apliki normojn de kultura-socia movado kunpuŝiĝis kun la “amikeca” etoso de la “samideanoj”, faktoro tre grava en la komenca periodo de Esperanto, sed poste ofta bremsilo de progreso kaj kaŝilo de konfliktoj. Per la ignoro de kariĝintaj sentimentoj, per la rompo kun balastaj tradiciaĵoj kaj per la senkompata batalo kontraŭ negativaĵoj (kiujn pli frue oni kutimis balai sub la tapiŝon de samideaneco) Lapenna necese kreis al si kontraŭulojn. Krome, kvankam por la plej multaj el siaj agoj li disponis la mandaton de la tuta Estraro aŭ eĉ Komitato, ofte estis sole Lapenna tiu, kiu devis (aŭ povis) defendi difinitajn organizajn paŝojn antaŭ la nesufiĉe informita publiko, enkasigante tiel persone ĉiujn damnojn kaj anatemojn, kio ja plej ofte eĉ estas la kutima sorto de la grandaj gvidantoj.

Sed, por reveni al Hamburgo kaj la surprizaj okazintaĵoj tie, ni emfazu, ke la supraĵa, frue venanta revuo de la movada kariero de Ivo Lapenna, kiun vi legis en la supraj alineoj, ŝuldiĝas al la kompleteco, kiun al sia ekŝiĝo volis doni Lapenna mem. Tiu kompleteco kaj definitivo de lia ekŝiĝo — ni emas firme kredi tion — ŝuldiĝas al trista kaj plurflanke tragika miskompreno inter Lapenna mem unuflanke, kaj la generacio de liaj lernantoj aliflanke. Nenio nova fakte, sed la ĝis nun en la Movado plej forte spertita miskompreno inter la gvidanto kaj liaj disĉiploj, la neevitebla disharmonio de la opinioj inter du generacioj, la kutima kolizio inter la konservativismo kaj progresemo. La nova generacio, kiu en Hamburgo ĉesis epizode roli, volas nenion, kio esence ne similas al tio, kion volis Ivo Lapenna kiam li kiel 27-jarulo transprenis la gvidadon

Rezolucio 3

La 59a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Hamburgo, FR Germanujo, de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1974, pritraktante la ĉefan temon de la Kongreso, nome “Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo”, kaj ellaborante la agadon de Universala Esperanto-Asocio por la tuj venontaj jaroj,

konstatas, ke nur per unueca celkonscia laboro la Asocio prosperos;

apelacias al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, kaj ĉiuj unuopaj membroj, realigi la diversflankan agadon tuŝitan en la Tria Baza Laborplano de UEA, akceptita en Beograd, 1973,

kaj plue emfazas, ke la principo de aktiva neutraleco, tia, kia ĝi estis praktikata en la laboro de UEA en la lastaj jaroj, estas la sola ebla vojo por la prosperigo de la Asocio, grava unuiga forto por ĝia laboro, kaj plej bona kondiĉo por efika kaj harmonia internacia kunlaboro en la kadro de la Asocio.

de Jugoslavia Esperanto-Ligo, kiam li kiel 29-jarulo eniris la Estraron de Internacia Esperanto-Ligo. Ĉu estas peko, ke la nova generacio en Hamburgo insistis, ke ĝia ĉefparolanto (en la funkcio de la prezidanto de UEA) ankaŭ fizike apartenu al la generacio, kiun li reprezentas?

Sekve de la hamburgaj ŝanĝoj, en la baldaŭa estonteco oni povas atendi adaptojn, eble eĉ radikalajn, sed radikalajn ŝanĝojn de la linio de Lapenna oni ne atendu, ĉar ili ne okazos.

Oni emas kun sentimentoj paroli pri la “falo de Lapenna” en Hamburgo, sed la “falo” ne okazis. Okazis sole la stafeta pludono de la torĉo, natura kaj necesa por movado, kiu volas konkeri la mondon. Konsentite, Lapenna estas genia kaj lia kontribuo al la Movado estas grandioza. Sed, ĉiu emo identigi la personecon de Lapenna kun la tuta Esperanto-movado estas danĝera kaj tamen senbaza. Lapenna konstruis la modernan UEA, sed la foriro de la konstruinto ne signifas ruiniĝon de la domo, interalie, ankaŭ pro la kvalitoj de la konstruinto.

Rezolucio 2

La 59a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Hamburgo de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1974, kun 1 650 partoprenantoj el 50 landoj,

notinte, ke Unuiĝintaj Nacioj decidis organizi vastan dekjaran agadon kun la celo elradikigi rasismon kaj ĉiujn formojn de rasa diskriminacio,

konstatante ankoraŭ foje, ke la respekto por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas baza kondiĉo por la plua progreso de la Internacia Lingvo,

opiniante, ke la lingvaj obstakloj estas unu el la aspektoj de rasaj antaŭjuĝoj kaj ke lingva diskriminacio estas unu el la ĉefaj formoj de kultura diskriminacio,

esprimas sian plenan apogon al la planitaj agadoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por la Jardeko de Aktivado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion,

bonvenigas la specialan laborplanon de Universala Esperanto-Asocio por la Jardeko, **aliĝas** al ĝiaj instigoj al la registaroj aliĝi, ratifi kaj realigi la principojn de la Konvencio pri Elimino de Ĉiuj Formoj de Rasa Diskriminacio kaj aliaj konvencioj en la sfero de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kaj

alvokas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn al mondskala kunlaboro por efika plenumo de tiu laborplano de UEA.

Kun estimo kaj sincera danko

EN TIU ĈI NUMERO de la revuo, vi legos kaj pri la pasinteco kaj pri la estonteco de nia Asocio. Kvankam la numero ĉefe estas dediĉita al la programo de la ĵus okazinta Universala Kongreso, la grandaj ŝanĝoj en la gvidaj organoj de la Asocio influis, ke ankaŭ en ĉi tiu numero jen kaj jen eblas ĉerpi informojn pri la estonta agado de UEA, pri la laborprogramoj de la novaj Komitato kaj Estraro. Vi konstatos, ke tiuj informoj sugestas, ke oni povas atendi periodon de interna refortiĝo kaj unueciĝo, — periodon dum kiu la ĉefaj linioj kaj prioritatoj de la Asocio restos senŝanĝaj, dum kiu la Asocio ankoraŭ pli kuraĝe malfermiĝos al la ideoj kaj iniciatoj de siaj membroj.

Ŝanĝo de gvidantaro, transiro al nova generacio, ĉiam alportas siajn ŝokojn kaj dolorojn. Ĉi-foje la plej doloriga aspekto de la ŝanĝoj estis la demisioj kaj retiriĝoj de kelkaj niaj plej elstaraj kolegoj. Pri la retiriĝo de prof. Lapenna vi legos aliloke en ĉi tiu numero de la revuo. La kompleto de lia retiriĝo sendube estis la plej ŝoka el ĉiuj. Krome, retiriĝis kiel Honora Membro kaj komitatano B f-ino M.H. Vermaas, kiu dum jaroj servis la Asocion kiel direktorino de la Centra Oficejo kaj poste kiel unu el niaj plej aktivaj komitatanoj kaj kunlaborantoj. S-ro Jean Thierry demisiis kiel komitatano B; s-ro Harry Holmes anoncis sian intencon retiriĝi el la Honora Prezidenteco.

Notante kaj bedaŭrante tiujn ekziĝojn, mi povas nur esprimi mian malĝojon, ke tiuj homoj sentis sin devigitaj forlasi la aktivan rolon, kiun ili ludis en la Asocio. Tamen, niaj admiro kaj estimo de iliaj kontribuoj al UEA restas grandaj kaj sinceraj.

Mi deziras ĉi tie esprimi apartan dankon ankaŭ al la plurjara vicprezidanto de UEA s-ro Erik Carlén, kiu decidis ĉi-jare retiriĝi post dekjara estraraneco; dankon ankaŭ al prof. Boža Popović, nia dua vicprezidanto, al s-ro Jerzy Uśpieński kaj al d-ro John C. Wells; dankon al s-ro Günther Becker, kiu depost 1964 funkciis kiel ĝenerala sekretario de UEA. Al ĉiuj ĉi amikoj la nova Estraro esprimas sian sinceran dankon kaj profundan konvinkon, ke la laboro de ili plenumita formas firman bazon por novaj sukcesoj de la Esperanto-movado.

Humphrey Tonkin,
prezidanto de UEA

Impona reprezentiĝo

La 59a Universala Kongreso de Esperanto, kiun en Hamburgo, inter la 27a de julio kaj la 3a de aŭgusto 1974, partoprenis 1 650 kongresanoj el 50 landoj, restos en la memoro ne nur pro la elektoj, kies karaktero donis la bazan tonon al la tuta kongresa semajno, sed ankaŭ pro la perfekteco de la organiza fluo de la kongresaj laboroj, pro la LKK, kies senlaco estis impona, pro la mirinda taŭgeco de ĉiuj kongresaj ejoj, pro la publika interesiĝo, kiun la Kongreso vekis kaj pro la reeĥo, kiun ĝi havis. Ĝi estis sukcesa kongreso el ĉiuj vidpunktoj.

LA SOLENA INAŬGURO de la 59a UK okazis dimanĉon, la 28an de julio 1974, en la impona ĉef-salono de la Kongresa Centro Hamburgo. En la ĉeesto de pli ol 1 600 kongresanoj el pli ol 50 landoj kaj ĉ. 200 gastoj el Hamburgo, la Kongreson malfermis prof. d-ro Ivo Lapenna, la ĝisnuna prezidanto de UEA. Poste sekvis bonvenigaj vortoj de la prezidanto de LKK d-ro Werner Bormann.

La dua (dum la kongresa semajno, la aganta) urbestro de Hamburgo, prof. d-ro Biallas, samtempe senatano pri kulturo, bonvenigis la kongresanojn al la Libera kaj Hansa Urbo Hamburgo. En sia inspirita parolado, la urbestro atentigis pri parencaj trajtoj inter la spirito



Prof. d-ro Biallas: Profundaj radikoj de internacia pensmaniero. (Dekstre: s-ro U. Lins, kiu interpretis).

de Hamburgo kaj la idealoj de la Esperanto-movado. Prof. Biallas finis sian vervan paroladon per citaĵo de Johann Gottfried Herder: "Tiu ĉi estas unu el ni; tiu estas fremdulo" — tiel parolas malgrandanimuloj. La mondo estas nur unu unueca domo. Kiu rigardas la aferon de la homa gento kiel la sian, tiu partoprenas en la laboro de la dioj, tiu partoprenas en la Fato."

En la nomo de la Alta Protektanto, la federacia ministro pri scienco kaj klerigo s-ro Helmut Rohde, la Kongreson salutis d-ro Rommel, kiu interalie diris: "Hodiaŭ vi kolektiĝas la 59an fojon, el multaj landoj de la mondo, por interŝanĝi opiniojn kiel akceli kaj evoluigi internacie uzatan lingvon. Esperanto jam tra kelkaj jardekoj pruvis, akompanate de multaj malhel-poj, ke homoj super landoj kaj malsamaj sociaj sistemoj povas paroli kaj interkompreniĝi unu kun la alia. Kun la kreo de Esperanto estis ligitaj grandaj esperoj, nome pri antaŭenigo de internacia interkompreniĝo, kultura kaj politika interŝanĝo. Ni hodiaŭ iĝis realismaj: ni scias, ke la fundamenton por progreso necesas krei per etaj paŝoj. En tiu senco via klopodo por la plua evoluo de Esperanto kiel vivanta fremda lingvo devas esti pli bone rekonata kaj agnoskata."

Malgraŭ la fakto, ke Hamburgo rilate la nombron de eksterlandaj konsulejoj cedas la unuan lokon en la mondo nur al Nov-Jorko, pro la fakto, ke ĝi ne estas tutlanda ĉefurbo, neniuj atendis tiel amasan reprezentiĝon de landoj kaj registaroj, kia okazis en la Solena Inaŭguro de la 59a UK. La Kongreson salutis reprezentantoj de: Aŭstralio (la konsulo Henty), Aŭstrio (la ambasada sekretario d-ro Maultaschl), Bolivio (la ĉefkonsulo d-ro H. Guzmán Soriano), Bulgario (la estro de la komerca misio Vasiljev), Finnlando (la vickonsulo s-ro Koch), Hispanio (la konsuleja kanceliero Iñigues), Israelo (la konsulo Kino), Japanio (la ĉefkonsulo Takamatsu), Norvegio (la kapitano Bugge-Paulsen), Nov-Zelando (s-ro J. Major), Pollando (la ambasada konsilisto Czarnecki), Usono (la ĉefkonsulo Brogan) kaj Suda Vjetnamio (la ambasadoro Nguyen Phuong Thiep). Krome, la Inaŭguron ĉeestis (sed ne parolis) reprezentantoj de Belgio, Britio, Nederlando kaj Svislando. La ĉefkonsulo de Svedio devis last-minute rezigni pri la anoncita ĉeesto. La konsulo de



La reprezentantoj de la landaj asocioj dum la Solena Inaŭguro sidis sur la prezida podio, sed ili ĉi-foje ne longigis la inaŭguran solenaĵon: Ĉu Hamburgo tiurilate ne donis bonan ekzemplon ankaŭ por la estontaj kongresoj?

Sud-Afriko ĉeestis en la Urba Akcepto (la 29an de julio), kaj la konsulo de Suda Koreo aranĝis specialan akcepton por kvindek da kongresanoj, honore al la korea eksministro pri eksterlandaj aferoj s-ro D.S. Choi, kiu partoprenis la Kongreson. Plie, skribajn salutojn al la 59a UK sendis altrangaj funkciuloj de Cipro, Germana Demokrata Respubliko, Indonezio, Kanado, Meksikio, Tajlando, Turkio kaj Vatikano. Estas aparte notinde, ke la Kongreson alparolis ankaŭ la brita opozicia ministro pri kulturo kaj estro de la Grupo por Esperanto en la Brita Parlamento s-ro Ernle Money. Parolis ankaŭ reprezentantoj de tri internaciaj organizaĵoj: Socialista Internacio (d-ro Mena-bene), Skolta Monda Oficejo (s-ro Berggreen) kaj Tutmonda Federacio de Sciencistoj (prof. Peevski).

Estas evidente, ke la nombro de oficialaj reprezentantoj de landoj, registaroj kaj internaciaj organizaĵoj estas de jaro al jaro ĉiam pli granda en la Universalaj Kongresoj. Erare estas rigardi tion nur kiel diplomatan ĝentilaĵon, kiel ceremonian formalizaĵon, ĉar tio ĝi ne estas. Se tiom da altrangaj ŝtataj reprezentantoj ne nur venas kaj parolas en la inaŭguroj de niaj kongresoj, sed ankaŭ klopodas alparoli la kongresanojn en la Internacia Lingvo — tion ĉi-jare faris la reprezentantoj de Israelo, Norvegio, Nov-Zelando, Usono kaj la brita opozicia kultur-ministro (speciale veninta pro tio al Hamburgo) — tio estas valora rekono de la seriozeco, kiun la hodiaŭa mondo atribuas al la Esperanto-movado, tio estas reala frukto de tiuj plurjarde kaj klopodoj de prof. Lapenna, pri kiuj ni parolas en la enkonduka artikolo de tiu ĉi numero.

La Solena Inaŭguro ankaŭ ĉi-jare spertis la saman problemon kiel dum kelkaj lastaj jaroj, depost la altiĝo de la nombro de oficialaj ŝtataj reprezentantoj, — la tuto estis impona, sed ankaŭ lacige longa. Pro tio la kutimaj salutoj de la reprezentantoj de la landaj asocioj de UEA ĉi-jare havis nekutiman, sed eble imitindan formon: estis nur legitaj la nomoj de la landoj kaj reprezentantoj, kiuj dum la Inaŭguro sidis sur la podio.

Tradicie, la inaŭguroj de la Universalaj Kongresoj kulminas per la festparoladoj. La Festparolado de prof. Lapenna en la ĉi-jara Inaŭguro estis, kiel kutime, retorika ĉefverko, kies lastaj alineoj (v. la paĝon 146) ŝokis la plimulton de la kongresanoj kaj provokis verajn ovaciojn al la personeco de la ĝisnuna prezidanto de UEA.

La muzikajn programojn en la Solena Inaŭguro alt-nivele plenumis Reinbeker Stadtorchester, kiu akompanis ankaŭ la komunan kantadon de la Himno, per kiu finiĝis la impona inaŭgura sesio de la 59a Universal Kongreso de Esperanto.

Rezolucio 1

La 59a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Hamburgo de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1974 kaj

diskutis la ĉeftemon “Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo”,

konstatas, ke nun tre plifortiĝanta potenco de unuopaj ŝtatoj povas malfavore influi la gravan rolon de la internaciaj institucioj, kiuj estas nepre necesaj por la plua evoluo de la mondo en la spirito de la internacia kunlaboro;

substrekas, ke unu el la kaŭzoj por tiu tendenco estas la ankoraŭ nesufiĉa subteno de internaciaj institucioj flanke de vastaj popolamasoj, kiuj bezonas por siaj ĉiam pli intensiĝantaj rilatoj facilan rimedon de interkompreniĝo, kiu prezentiĝas en la internacia lingvo Esperanto;

sekve atentigas pri la utilo, kiun donus al internacia kunlaboro la apliko de Esperanto kiel solvo de internaciaj lingvaj problemoj.

FESTPAROLADO
DE PROF. D-RO IVO LAPENNA
(Fragmento):

Trovi
la necesan
kuraĝon



NUN, estimata prezidantaro kaj estimataj geamikoj, mi deziras anonci al vi, ke mi decidis ekŝigi el ĉiuj funkcioj en Universala Esperanto-Asocio. Farinte tiun decidon mi prenas la kuraĝon diri al vi kelkajn adiaŭajn vortojn.

Dum dudek kvin jaroj ni konstruadis — ni, nome tiuj, kiuj efektive kunlaboris, kiuj fidis je la neŭtraleco de UEA, kiuj komprenis, ke la neŭtraleco de UEA estas bazo de ĝia universaleco — ni konstruadis la modernan, fortikan kaj prestiĝan UEA, surbaze de principoj, prilaboritaj jam en la jaroj 1948, 1949 kaj 1950. Agante laŭ tiuj principoj, ni malfermis multajn pordojn, ni traboris multajn murojn kaj vastigis la eblecojn por la uzado de la Internacia Lingvo. Universala Esperanto-Asocio duobligis sian membraron; ĝi kreis la gravan Centron de Esploro kaj Dokumentado (1952), kaj dank'al tiu Centro, kiu povis nutri la neŭtralan Esperanto-movadon kaj la ĝeneralan Esperanto-movadon per gravaj dokumentoj kaj bonaj argumentoj, ni sukcesis progresigi Esperanton konsiderinde en la lastaj dudek jaroj. Multaj pordoj malfermiĝis, precipe rezulte de la grava Rezolucio de Unesko de la 10a de decembro 1954, kiam la plej grava interŝtata organizaĵo por la edukado, scienco kaj kulturo, rekonis la edukan, kulturan kaj sciencan valoron de la Internacia Lingvo. Multaj aliaj eblecoj ekzistis por ni, kaj ni vaste utiligis ilin pro la konsultaj rilatoj kun Unesko kaj alispecaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj, kiujn havas UEA. Tio ebligis al ni aŭdigi nian voĉon kaj tre ofte havigi pozitivajn rezultojn por nia afero. Unu el la pozitivaj rezultoj atingitaj en la lasta tempo estas, ke nun en la sistemo de neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unesko ĉiu nia reprezentanto povas paroli en la Internacia Lingvo, se li tion deziras kaj se li prizorgas la tradukadon en unu el la laboraj lingvoj. En pluraj landoj — en dudeko da ili — ekzistas juraj eblecoj por la instruado de la Internacia Lingvo en la elementaj lernejoj. Ankaŭ tiu pordo, geamikoj, estas malfermita. Tute laste, dank'al la premo de Universala Esperanto-Asocio kaj al la premo de kelkaj aliaj amikaj internaciaj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unesko, ni povas nun havi bonajn rilatojn sur landa nivelo inter niaj landaj asocioj kaj la respektivaj landaj Unesko-komisionoj. Pri tio ĉiuj asocioj estas informitaj. Nia ILEI,

la organizaĵo de Esperanto-instruistoj, nia skolta organizaĵo, nia scienca organizaĵo kaj multaj aliaj fak-organizaĵoj, kiuj ankaŭ partoprenas tiun ĉi kongreson, kaj faras ĝin siaspeca unika kongreso — kongreso de kongresoj — de la hodiaŭa mondo, fortikiĝis kaj sukcese agas en siaj respektivaj medioj.

En tia situacio, ni rigardu momenton al la ekstera mondo. Kiel ĉiuj observantoj povis antaŭvidi antaŭ multaj jaroj, la lingva problemo komplikiĝis kaj ĉiam pli komplikiĝas. Memoru, ke, kiam fondiĝis Unuiĝintaj Nacioj, estis kvin oficialaj kaj du laboraj lingvoj. Nun en la daŭro de unu jaro, ekde nia lasta kongreso en Beograd, aldoniĝis du pliaj laboraj kaj oficialaj lingvoj en pluraj organoj de Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj aliaj organizaĵoj. Tio signifas, ke nun en tiuj organizaĵoj estas ses oficialaj kaj laboraj lingvoj. Se ni rigardas al la regionaj organizaĵoj de Eŭropo, ni vidas la saman aŭ malpli bonan situacion. Kien ajn vi ĵetas la rigardon en la mondo, de la plej altaj sciencaj institucioj ĝis la problemoj, kiujn vi renkontas sur la ŝoseoj de Eŭropo, la lingva demando komplikiĝas. Se tiel, se la lingva problemo fakte komplikiĝas, se ĝi eniras en sakostaton, el kiu ne ekzistas eliro krom unu sola, tiam nia rolo fariĝas ekstreme granda, ĉar mi kredas, ke estas afero de nur kelkaj jaroj, ne plu jardekoj, ĝis la homaro devos akcepti unu solan lingvon: la materiaj kondiĉoj en la mondo puŝas ĝin al unu sola lingvo. Ni fidas, ke nia solvo estas la plej bona, sed ekzistas aliaj, kiuj kredas, ke iliaj solvoj estas pli bonaj, precipe la solvo per unu sola nacia lingvo, ĉu angla, la franca, la hispana aŭ la rusa aŭ iu ajn alia. En tiaj kondiĉoj, kiam la materiaj fortoj puŝas al la solvo kaj kiam estas pluraj eblaj solvoj, la organizita neŭtrala Esperanto-movado devas utiligi tiujn eksterordinare favorajn kondiĉojn, pli favorajn ol iam ajn en la historio de la homaro, por antaŭenpuŝi la aferon de la Internacia Lingvo. Mi fidas ke tio estas ebla nur laŭ la metodoj, kiujn UEA aplikis dum la lastaj 25-26 jaroj. Sed, se la nova gvidantaro de UEA trovos pli bonajn metodojn, mi estos la plej feliĉa rekoni, ke tiuj metodoj montriĝis ĝustaj. Per tiuj vortoj, karaj geamikoj, mi tre kore salutas vin. Mi deziras, ke tiu ĉi kongreso estu ege sukcesa, kaj ke ĝis la fino de tiu ĉi semajno UEA retrovu tiujn kuraĝon kaj saĝon, kiuj estas necesaj por antaŭenigi Esperanton en la sekvanta historia periodo. Dankon.

Neŭtraleco estas kaj restos la ĝusta vojo

PRO LA FAKTO, ke la 59a UK abundis je nekutimaj kaj plurilate ŝokaj eventoj (malgraŭ la organizaperfekto laŭ kiu ĝi evoluis), kiam sabaton, la 3an de aŭgusto, venis la tempo de la Solena Fermo, ne nur la organizantoj, sed ankaŭ la partoprenantoj de la Kongreso sentis iaspecan liberigon de unu malfacila semajno, kiu verŝajne estos memorata kiel decida cezuro en la postmilita evoluo de la Esperanto-movado. Enkonduke al la Solena Fermo, la nova prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, prezentis la nomojn kaj funkciojn de la nova Estraro de UEA (v. la duan kovrilan paĝon), kaj poste s-ro Wensing, la nova ĝenerala sekretario, raportis pri la laboro de la Komitato kaj ĝeneralaj kunvenoj. D-ro Tonkin daŭrigis per danko al la ĝisnunaj estraranoj kaj, aparte, al la eksiginta prezidanto prof. Lapenna, pri kiu li diris:

“Ne estas al mi eble, en malmultaj vortoj, skizi la kontribuon de la eksiginta prezidanto de UEA al Esperanto. Entute, oni bezonus longan paroladon por tion fari, kaj eĉ tiam, tamen, la vortoj neniel sufiĉus. Dum trideko da jaroj, d-ro Ivo Lapenna, universitata profesoro nun en la Londona Universitato, per sia spirito kaj sia kuraĝo trenis la Esperanto-movadon al novaj altoj de atingoj. Apenaŭ iam antaŭe en la

Esperanto-movado ni vidis tiel gigantan personecon (*longa aplaŭdo*). Anstataŭ lin laŭdi ĉi tie, ĉar mi scias, ke li tion ne volus, anstataŭ lin laŭdi ĉi tie, mi nur ripetu tion, kion mi diris jam en la Komitato: Se mi kaj mia Estraro havos nur etan parton de la kuraĝo de prof. Ivo Lapenna, ni estos kontentaj. Kaj se ni povos per tiuj niaj malmultaj fortoj porti UEA ankoraŭ pli alten, al tiu fina pinto al kiu ni ĉiuj strebas, ankaŭ tiam, mi estos danka ĝuste al la vojo, kiun montris Ivo Lapenna.”

D-ro Tonkin plue substrekis, ke unu el la karakterizoj de la Kongreso estis ĝuste la nombro de la homoj, kiuj laboris por sukcesigi ĝin. Li esprimis sincerajn dankojn al la Alta Protektanto, al la urbo Hamburgo kaj ĝiaj instancoj, al la Kongresa Centro kaj ĝiaj funkciuloj. La nova prezidanto de UEA direktis siajn specialajn dankojn, unuope al ĉiuj membroj de la Loka Kongresa Komitato, substrekante la gravecon kaj pezon de la laboro, kiun LKK tiel bonege plenumis.

Post la prezento de la tri kongresaj rezolucioj (v. aliloke en ĉi tiu numero), d-ro Tonkin, nome de la nova Estraro, mallonge parolis pri la estonta agado de UEA. Li emfazis, ke la aktiveco de la Asocio, en la tuja estonteco, ĉefe direktiĝos al jenaj tri demandoj:

“Unue, kaj nepre unue, sanigo de la financoj de la Asocio; due, pliefikigo de la administrado de la Asocio; trie, pli efika organiziĝo de niaj diversaj homaj laborfortoj en la Movado.” La prezidanto plue parolis pri nova laborstilo, kiun la Estraro intencas ekpraktiki, kaj kies ĉefa karakterizo estas klopodoj laborigi kiel eble plej multe da homoj, tute aparte la Komitaton, interalie per funkciigo de pluraj komisionoj pri unuopaj kampoj de la aktiveco. D-ro Tonkin aparte emfazis, ke li esperas, ke la eksigo de pluraj elstaraj personoj el siaj funkcioj en la Asocio montriĝos nur portempa, provizora afero, kaj, ke ili ĉiuj “revenos al respondecaj funkcioj en UEA”. Li forte akcentis, ke “neŭtraleco estas kaj restos la ĝusta vojo por nia Asocio”. La nova prezidanto de UEA finis sian paroladon en la Solena Fermo de la 59a UK per jenaj vortoj:

“Mi transprenis la prezidantecon en cirkonstancoj por nia Movado malfacilaj. Mi tion faris, ĉar mi havis almenaŭ tiom da kuraĝo. Sed, se entute ni ĉiuj povos havi sufiĉan kuraĝon por antaŭenigi nian aferon kaj prosperigi nian Asocion, ni ne povos solaj labori. Mi ĉi tie petas al vi ĉiuj, kaj per tiuj ĉi vortoj al la tuta Esperanto-movado, reunuiĝi, reunuigi niajn fortojn por la batalo, kiu staras antaŭ ni.”



D-ro Humphrey Tonkin, la nova prezidanto de UEA: La nova generacio transprenis la gvidan rolon.

La komitata neefikeco

Iom pli ol kiel kutime dum la Kongresoj en kiuj okazas la elektoj por la organoj de UEA, la hamburgajn kunsidojn de la Komitato karakterizis drameca etoso, nutrata ĉefe de la polarizo, kiun ni mencias en la ĉefartikolo de ĉi tiu numero. Tia etoso grave vundis la efikecon de la komitataj kunsidoj, dum kiuj oni ne faris multajn decidojn kaj ne sukcesis trakti plurajn gravajn demandojn. Male, la nova Estraro en siaj unuaj kunsidoj montriĝis efika kaj sukcesis pritrakti tutan aron da problemoj, per kiuj ĝin ŝargis la Komitato.

EN SES KUNSIDOJ, kiuj daŭris minimume 18 horojn, la Komitato de UEA devis en Hamburgo trakti ampleksan tagordon de 24 eroj, sed oni sukcesis findiskuti nur tiujn punktojn de la tagordo, kiuj kondukis al jenaj decidoj: akcepto de la Estrara Raporto kaj la Raporto de CED pri la agado en 1973/74; malŝarĝo de la Estraro pri la financa administrado de la Asocio en 1973; senŝanĝa akcepto de la Laborplano de UEA okaze de la Jardeko de aktivado por kontraŭbatali rasismon kaj rasan diskriminacion; elekto de 13 novaj komitatanoj C (el inter 29 kandidatoj); elekto de la nova Estraro de UEA, kies konsiston vi trovas sur la dua kovrila paĝo de ĉi tiu numero; starigo de konstantaj komisionoj pri: financo kaj administrado, revizio de la Statuto, kongresoj kaj konferencoj, landaj asocioj kaj regiona agado, eksteraj rilatoj kaj parlamenta agado, informado; akcepto de la tri kongresaj resolucioj. Plimulton de la aliaj eroj en la tagordo, la Komitato donis al la nova Estraro por plua pritrakto.

Kiam temas pri la nova Estraro kaj ĝiaj du ĝisnunaj kunsidoj — la unua okazis la 2an de aŭgusto en Hamburgo, kaj la dua la 10an de aŭgusto en Roterdamo — la rikolto de fintraktitaj demandoj kaj novaj decidoj estas multe pli granda. Ni ĉi tie klopodos resumi nur la plej gravajn el ili.

La 60a Universala Kongreso de Esperanto okazos inter la 26a de julio kaj la 2a de aŭgusto en Kopenhago, dank'al la fakto, ke grupo de tieaj aktivuloj proponis siajn servojn por solvi la problemon de la venontjara kongresurbo. Ke la kopenhaga LKK jam ekfunkciis pruvas ankaŭ la fakto, ke vi aldone al ĉi tiu numero jam trovas la aliĝilon kaj eventuale ankaŭ la Unuan Bultenon, se oni sukcesos finpresi ĝin (alikaze, ĝi atingos vin kun la oktobra numero, en kiu vi trovos ankaŭ multajn detalojn pri la 60a UK).

La financa situacio de UEA estis grava temo ankaŭ en la komitataj kunsidoj en Hamburgo, kaj en la kunsidoj de la Estraro ĝi certe estis la ĉeftemo. Por sanigi la financon de UEA, la Estraro interalie decidis: ke la Jarlibro, ekde 1975, aperu en unu volumo, ke la librolisto fariĝu aparta eldonaĵo de la Libro-servo de UEA kaj aperu laŭbezzone, ke la Estrara Raporto, en pli konciza formo, estu distribuata al la

komitatanoj, kongresanoj kaj tiuj individuaj membroj, kiuj ĝin petas, ke ĉesu aperi la bulteno *Unesko-novaĵoj* kaj, ekde 1975, la *Eltondaj servo*, sed, ke oni samtempe faru klopodojn plibonigi la ĝeneralan informadon. Krome, la Estraro decidis redukti la nombron de oficistoj en la Centra Oficejo kaj fari paŝojn al simpligo de la membrokategorioj kaj kongreskotizoj. Por malŝarĝi la centrajn organojn, oni faros klopodojn transdoni diversajn taskojn al eksteraj kunlaborantoj kaj aktivigi la konstantajn komisionojn de la Komitato. La Estraro ellaboris novan buĝeton por la jaro 1975 kaj ĝi nun estas konsiderata de la Komitato, kiu faros pliajn tiurilatajn decidojn, pri kiuj ni raportos en la sekvanta numero.

Lige al la eksigo de la fondinto kaj honorofica direktoro de CED, prof. d-ro Ivo Lapenna, la Estraro decidis, ke la arkivo de CED estu transportita al sia nova sidejo en la Domo de UEA en Rotterdam. D-ro Jonathan Pool funkcios kiel aganta direktoro de CED kaj pristudos la eblecojn de necesa reorganizo. La abonoj por la dokumentoj de CED, pagitaj por 1974, validos ankaŭ por la jaro 1975.

La Estraro decidis ĉiel klopodi starigi bonajn kaj efikajn kontaktojn kun ĉiuj grupoj, gazetoj, instancoj kaj organizaĵoj, kiuj pozitive laboras por la disvastigo de Esperanto. Oni aparte emfazis la neceson, ke tiuj rondoj estu daŭre informataj pri la agado de UEA.



Ges-roj Vermaas, Wells kaj Aleksiev nombras voĉojn: Rido malofte gastis en la hamburgaj komitatkunsidoj.

La Estraro esprimis sian subtenon al Someraj Universitataj Kursoj, kaj pri la Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI) konstatis, ke ĝi funkcias laŭ propra, jure valida, statuto kaj ne havas iajn devigajn ligojn kun UEA.

Laste, ankaŭ nia revuo troviĝis en la tagordo de la nova Estraro. Estas renomita la ĝisnuna redaktoro kaj esprimita intenco, ke la revuo estu malfermita al diverseco de opinioj kaj respegulu la interesojn de la aktiva esperantistaro. Oni faros apartajn klopodojn por esplori eblecojn altigi la nombron de abonantoj en orienteŭropaj landoj, eventuale per krompresigo de la revuo en unu el tiuj landoj.

Konklude, necesus eble aŭ bonvenus eventuale klarigo pri la “sekeco” de ĉi tiu skiza raporto pri la komitataj kaj estraraj kunsidoj en Hamburgo. Almenaŭ tiuj, kiuj dum la Kongreso ĉeestis la komitatajn kunsidojn — kaj estis bonŝanco elbatali tie starlokon en la publiko — konstatos, ke ni en ĉi tiu raporto neglektis la tutan fajron, ĉiujn procedurajn konkurojn, personajn atakojn kaj kontraŭatakojn, ofendojn kaj vunditajn dignojn, eksplodojn kaj galelverŝojn. Ni evitis raporti al vi pri tiuj ĉeftraĵoj de la hamburgaj komitataj kunsidoj, ne nur pro nia opinio, ke tiaj aferoj ne devas okupi spacon sur la paĝoj de nia revuo (pardonu, ke tio kelkfoje okazis en la pasinteco!), sed pro nia profunda konvinko, ke ankaŭ la hamburgaj kunsidoj ne devis esti la scenejo de tia absurda teatraĵo.

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO:

Granda interesiĝo

LAŬ LA FAKAJ KVALIFIKOJ de la prelegintoj en Hamburgo, la 27a Sesio de Internacia Somera Universitato estis unu el la plej prestiĝaj en la ĝisnuna historio de ĉi tiu valora scienca institucio. Kiel rektoro de la ĉi-jara sesio de ISU funkciis prof. d-ro Helmut Ebinger de la Hamburga Universitato, mem preleginta — kun surprize aktuala prezento de la temo — pri la moderna instruado de geografio. La aliaj prelegintoj estis: prof. d-ro Ivo Lapenna (Bazaj juraj aspektoj de la eŭropaj organizaĵoj), prof. d-ro Sin'itirô Kawamura (Kiu nutras nin homojn sur la Tero?), prof. d-ro Oton Pancer (La nuntempa agrikulturo kaj hortikulturo kaj ilia kontribuo al kreado de sana medio por la homaro), prof. d-ro Paul Neergaard (Urgaj taskoj de la scienco en la proksima estonteco), prof. d-ro Juan Régulo Pérez (Kanaria insularo kaj ĝia birdo la kanario), d-ro Mahomet Izmailoviĉ Isaev (La rolo de sciencisto en evoluo de lingvo), prof. d-ro Carl Støp-Bowitz (La didoj, birdoj ekstermitaj kaj pridiskutataj), prof. Gaston Waringhien (La inkunabloj de Esperanto), prof. Vasil Peevski (La scienco kaj la Internacia

Nova elekto „B”

Kiel raportite aliloke en ĉi tiu numero, en Hamburgo anoncis sian tujan eksigon el la Komitato 3 komitatanoj B — t.e. el tiuj elektitaj de la delegitaro. Sekve ekestis 3 vakaj lokoj, kaj la Estraro decidis inviti por tiuj 3 lokoj kandidatigojn kaj, se necese, okazigi novan balotadon.

Konforme al la Ĝenerala Regularo de UEA, la direktoro de la C.O. per tiu ĉi anonco invitas la ĉefdelegitojn kaj delegitojn (ne la vicdelegitojn aŭ fakdelegitojn) sendi proponojn pri kandidatoj kun iliaj skribaj konsentoj **antaŭ la 1a de januaro 1975** al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, kun koncizaj biografiaj informoj pri la kandidato kaj pri lia ĝisnuna agado en la Esperanto-movado.

Ni memorigas pri jenaj artikoloj de la Regularo:

“Kvin ĉefdelegitoj aŭ delegitoj rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio; la kandidato devas skribi konsenti al sia kandidatiĝo” (art. 28). “Povas esti elektita kiel komitatano nur persono, kiu estis Membro-Abonanto de UEA almenaŭ dum la 3 jaroj antaŭ la jaro de la elektoj” (art. 30).

Lingvo) kaj d-ro Kazimierz Kordylewski (La malkovro de polvaj terlunoj), kies prelegon pro la foresto de la aŭtoro prezentis A. Pettyn. Entute, 11 prelegintoj el 11 landoj, kun sufiĉe vasta temvario, iom tamen kritikebla pro la ĉeesto de du prelegoj pri birdoj, kaj preskaŭa manko de belartaj temoj. La prelegoj estis bone vizititaj (plej multnombre tiu de prof. Lapenna), kvankam montriĝis, ke la organizantoj malbone taksis la interesiĝon de la publiko pri unuopaj temoj, kiujn pro la malgrandeco de la salono ne povis aŭdi ĉiuj celintaj tion.



Pluraj prelegoj en ISU vekis grandan interesiĝon.

Nekonvena etoso

LA ATMOSFERO de la Hamburga Kongreso, elektrizita per la elektoj kaj eksigoj, ne estis konvena por la laboraj sesioj de la 59a UK, samkiel la antaŭkongresa periodo ne estis taŭga por bone prepari tiujn labor-kunvenojn.

LA UNUA ĜENERALA KUNVENO DE UEA: Sub la prezido de prof. d-ro B. Popović, unu el la ĝisnunaj vicprezidantoj de UEA, la Kunvenon ĉeestis ĉ. 300 kongresanoj. Post la tradiciaj salutoj de la fakaj asocioj (entute reprezentigis 15 organizaĵoj), la plej granda parto de la Kunveno estis konsumita per diskutoj pri la Estrara Raporto por la jaro 1973/74. La diskutintoj tuŝis plurajn gravajn temojn — la graveco de la laboro ĉe UN, Unesko kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj; la financa situacio de UEA; *La Monda Lingvo-Problemo*; dezirindeco de alispeca internacia ekzameno pri la supera instrukapablo de Esperanto —, sed la disponebla tempo ne sufiĉis por ilin pli funde trakti. Simile okazis kun la lasta ero en la tagordo — plifortigo de la landaj asocioj —, kiun enkondukis d-ro W. Bormann, la estrarano de UEA pri landaj asocioj.

INFORMAJ FAKOJ: La kunveno (ĉ. 30 partoprenintoj) diskutis problemojn de la informado al la ekstera publiko. Oni traktis la enhavon de la novaj broŝuroj *Por pli efika informado* de prof. Lapenna kaj *Manlibro pri varbado* de G. Conrad. P. Schilperoord (Britio) pledis pri aranĝo de apartaj seminarioj por informantoj pri Esperanto, dum F. Luin (Svedio) atentigis, ke tiuj informantoj plej ofte ne estas la estroj de la landaj informaj fakoj, sed simplaj membroj. D-ro Menabene raportis pri la agado de Esperanto en la Itala Socialdemokrata Partio.

LA DUA ĜENERALA KUNVENO DE UEA: La programero, kiu en kelkaj lastaj jaroj ĝuis prestiĝon de la ĉefa kongresa laboraranĝo (ekz. en la kongresoj de Londono kaj Beogrado), ĉi-jare ne sukcesis atingi tiun nivelon. Ĝia temo — Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo — estis trafe formulita kaj sukcesis allogi pli ol 500 kongresanojn, sed la jam aludita ĝenerala atmosfero en la Kongreso ne permesis, ke la pritrakto de la temo estu elĉerpa aŭ alimaniere atento-merita. Post la enkonduka prezento de la temo, fare de prof. Lapenna, la nemultaj diskutintoj daŭre stumblis ĉe la difinoj de la nocioj “nacio”, “etno”, “gento”, “minoritato” ktp.

Cetere, al la malsukceso de la Dua Ĝenerala Kunveno grave kontribuis ankaŭ la senpacienca atendado de la

klarigo de prof. Lapenna pri la motivoj de lia eksigo, kio estis anoncita por la fino de la Kunveno. Kaj, tiu adiaŭa parolado de la ĝisnunaj prezidanto de UEA, daŭrinta preskaŭ du plenajn horojn, revenis al la temoj, kiujn traktis lia aprila ĉefartikolo, al la temoj, kiuj inkube sieĝis la organojn de la Asocio dum la lasta duonjaro. Ni ne volas ĉi tie komenti tiun “katilinan paroladon” de Lapenna, nek ni volas kontraŭargumentii liajn akuzojn. Kun plena trankvilo, ni lasas, ke la tempo verdiktu pri la akuzoj de la plenmerita prezidanto de UEA, ke la evoluo kaj aktivecoj de la Asocio dementu la malbonaŭgurajn vortojn de prof. Lapenna. Granda parto de tiuj du hamburgaj horoj estis uzita por refoje revui la meritojn kaj atingojn, simile al tio kion ni faras en la ĉefartikolo de tiu ĉi numero. Sed — estu permesite diri — ĉio ĉi pli bele sonas kiam iu alia, ne Lapenna mem, faras odon al la grandioza verko de Ivo Lapenna. La adiaŭa parolado de la ĝisnunaj prezidanto de UEA finiĝis per jenaj vortoj: “Kiam Zamenhof pro similaj kaŭzoj estis devigita retiriĝi en Krakovo, li diris: ‘Vi ne plu vidos min antaŭ vi, vi vidos min inter vi.’ Mi ne faros kiel Zamenhof, ĉar, kvankam mi admiras lian naturon, mi havas alian naturon kaj mi ne hontas pro mia alia naturo. Mi do ne diras al vi: ‘Vi ne plu vidos min antaŭ vi.’ Mi ne diros, ke vi vidos min inter vi, sed mi diras al vi: Koran dankon kaj adiaŭ por ĉiam!”

LA DEBATO: Sub la prezido de d-ro J.C. Wells, ĉ. 200 kongresanoj ĉeestis, kaj 14 partoprenis la debaton pri la temo “Landaj revuoj en Esperanto — ĉu utilaj?”. Laŭ raporto de d-ro Wells, kies enkonduka artikolo pri la temo aperis en nia julia/aŭgusta numero (p. 121), la opinioj dividiĝis en du grupojn: unuj pledis pri la daŭra graveco de la landaj Esperanto-revuoj, sen kiuj la landaj asocioj apenaŭ povas kontentige funkcii; aliaj atentigis pri la grandega malŝparo de tempo, mono kaj fortoj, kiujn postulas la eldonado de la landaj revuoj. Laŭ la opinio de tiu dua grupo, sufiĉus, se la landaj asocioj al siaj membroj liveradus grafike senpretendan organizan bultenon, lasante la informan rolon pri la movadaj, literaturaj kaj aliaj novaĵoj al plurnacia aŭ internacia revuo. En tiu kunteksto estas menciitaj ankaŭ la ekzistantaj internaciaj periodaĵoj, kiaj estas *Heroldo* kaj nia revuo. Ĉiukaze, ŝajnas, ke la Debato en Hamburgo pruvis, ke la Movado estas ankoraŭ malproksima de unueca starpunkto rilate la rolon de la movada gazetaro.

REPREZENTANTOJ DE LANDAJ ASOCIOJ: La kunveno de ĉ. 80 personoj, gvidita parte de d-ro W. Bormann, kaj parte de s-ro J. Calado (Nederlando), montriĝis konvena okazo por interŝanĝi opiniojn pri la agado sur la landa nivelo, kion oni ne sukcesis fari en la Unua Ĝenerala Kunveno de UEA. Raportojn pri la stato de la Movado en siaj landoj faris reprezentantoj de Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Francio, FR Germanio, Hungario, Israelo kaj Norvegio. La diskuton partoprenis ankaŭ reprezentantoj de Britio kaj Svedio. La ĉefa temo de la kunveno estis “Kion fari kontraŭ la perdo de membroj?”.

Disciplino kiel artista virto

La kongresa programero per kiu la kongreslando prezentiĝas al la kongresanoj, en la pasinteco ofte signifis artisman pinton de la plej granda manifestacio de la Esperanto-movado. Kvankam la Germana Vespero en la 59a UK en Hamburgo alportis enviinde altan nivelon en la plenumo de ĉiu unuopa programero, ĝi restos en la memoro pli pro kuriozaĵoj ol pro artaj ĝuoj, kiujn ĝi liveris al la internacia spektantaro.

LA ĈEFA IMPRESO, kiun pri la Germana Vespero kunportis negermana spektanto, sendube estas la disciplino de la artistoj, la soldatece netaj manovroj de la dancistoj sur la scenejo, la senriproĉaj homvicoj de la korusanoj, la definitivaj trumpetsonoj de la orkestro. La metia lerto de la programintoj (malgraŭ la fakto, ke ili ĉiuj estas amatoroj), la disciplino per kiu ili lernis kaj plenumis siajn rolojn, — tio trudiĝis kiel ĉefvirto de la tri ensembloj en la Germana Vespero. Sed, ni klopodu trakti tiujn ensemblojn aparte.

La plej sukcesaj programeroj de la Vespero estis tiuj, kiujn prezentis la koruso Liedertafel Siek. Temas pri matura muzika ensemblo, kiun oni sopiras aŭdi en malpli granda salono por konatiĝi kun ĉiuj nuancoj de ĝia sono. Tamen, la plej bona programero de la 60-membra vira koruso estis la neplanita kanto en la hamburga dialekto, tiu, kiu la tutan spektantaron sukcesis transformi en iaspecan “ebrian ŝipon”, kies ŝipanaro verve “ŝunklis” laŭ invito de la dignopaŝa,

klarvoĉa, sed iom vortavara programgvidinto s-ino Elsbeth Wielgus. Feliĉe, ke venis tiu neplanita programero, kiu al la tuta Vespero aldonis iom da necesa etoso kaj pruvis, ke la kongresa popolo pretas je petolo. Krome, tiu hamburga kanto, plenumita nur de duona koruso, estis la plej sonora programero en la korusa repertuaro; nur ĝi sukcesis venki la volumenon de la areneca salono. Eble la aliaj programeroj, cetere, kantitaj en tute bona Esperanto, estis iom tro fajnaj por tiel granda aŭditorio, tiel, ke la koruso sonis iom dampite, ne sukcesante per sia sono saturi la vakuon de la salonego.

La folkloro dancgrupo — Veerlanner Speeldeel — eniris taĉmente sur la scenejon kaj same tiel forlasis ĝin. Estas maljuste meti sur la konton de la dancistoj la mankojn de la regiona folkloro kaj tiel necesas tuj emfazi, ke la dancistoj faris sian eblon kaj fajne prezentis ne aparte fajnajn dancaĵojn de la regiona folkloro. La koreografo eĉ montris kvalifikaĵojn kaj



Vira koruso Liedertafel Siek estis la plej bona ensemblo en la Germana Vespero, per kiu la kongresa lando volis prezentiĝi al la internacia publiko de la 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo.

emon al spektakleco, sed la dancoj mem estis tro malforta bazo por pli impresa spektaklo kaj, preskaŭ regule, duono de la dancgrupo restis kulise senmova homa ornamaĵo sur la scenejo. Estis evidente, ke la popola dancarto en la nordo de Germanio jam delonge estas muzeaĵo, kiun oni eĉ sur la scenejo malfacile revivigas. Tamen, la tria danco sukcesis impresi per sia vigleco.

La ĉasista blovorkestro de la distrikto Lübeck plenigis la plej grandan programparton de la Germana Vespero. Ĉefe al tiu ensemblo ŝuldiĝas la epitetoj de kuriozeco kaj disciplino, kiujn ni atribuis al la tuta Vespero. Aliflanke, la apero de la orkestro estis tutcerte la plej interesa programero, almenaŭ en la komenco kiam oni ankoraŭ ne konsciis, ke ni poste havos iom pli ol sufiĉe da ĉasistaj sonoj kaj simboloj. La tuto ne estis koncerta muziko, sed prefere — perfekta etnologia leciono kun abundo da sonaj (kaj en la fino ankaŭ bildaj) ilustraĵoj. Ni do lernis la ĉasistan lecionon, sed restis bedaŭrantaj, ke Germanio, kiu rilate sian muzikan heredaĵon apartenas al la metropoloj de la mondo, ne regalis nin per kelke da malpli elementaj muzikaj pecoj.

La apero de la legendiganta Jean Forge, kiu en la Germana Vespero faris ne aparte interesan, duan festparoladon de tiu tago (en kies mateno okazis la Solena Inaŭguro), havis sian ĉarmon, kiu malfacile kombiniĝis kun la resto de la programo. La legendo parolis iom tro klare, prezentante malnetajn krokizojn en flua protokola lingvaĵo. Iom strange, sed tiu proza klasikulo impresis min kiel unu el la plej bonaj deklamantoj iam aŭditaj. Ĝenerale, estas bona ideo inviti famajn nomojn partopreni en similaj programoj, sed la invito kaj apero per si mem ne ĉiam sufiĉas. La Germana Vespero estis sukcese plenumita, sed ĝia programo ne estis lerte elektita. Ne necesis koncepti ĝin tiom regione kaj loke, necesis doni pli adekvatan enhavon al la nomo de la Vespero. Necesas tamen noti, ke la publiko varme akceptis la programon, grave handikapitan per la foresto de la pompe anoncita kantista duo "Pat kaj Paul".

Bulgara Esperanto-Teatro el Sofio en la kadro de la 59a UK sukcese prezentis la komedion de Beaumarchais "La Barbiro de Sevil". Unu el la plej sukcesaj roloj en la teatraĵo estis tiu de Kosta Conev kiel Don Bazilio (maldekstre). Sukcese rolis ankaŭ Nikolai Binev (dekstre) kiel d-ro Bartholo.

TEATRO:

Ĝuebla klasikaĵo

KVANKAM ili kelkfoje deklaras la malon, bonaj aktoroj tamen vivas por siaj aplaŭdoj. Plej ofte ne gravas kion diras la recenzantoj, ĉar la definitiva verdikto pri la aktora arto esprimiĝas per la aplaŭdo de la spektantaro. Se aliĝi al tia starpunkto, necesas tuj komence diri, ke la teatra realigo en la kadro de la 59a UK en Hamburgo estis plia sukceso de la Bulgara Esperanto-Teatro kaj ĝia multjara givdanto Kiril Draĵev. Aliflanke, necesas tamen konsideri la teatran malsaton de la kongresa publiko, kiu spektas teatraĵojn en la Internacia Lingvo preskaŭ ekskluzive dum la kongresoj. Tiu malsato grave malpezigas la aklatan juĝon de la spektantaro, preta multon pretervidi kaj preskaŭ ĉion pardoni. Cetere, necesas graco por la teatraj entuziasmoj, kiuj laboregas dum monatoj por fine aperi plej ofte unu solan fojon antaŭ la publiko: ne eblas plibonigoj, adaptoj, retuŝoj, poluroj, — ĉio estas definitiva, nerevokebla. Ĝuste tio devas esti pezega psikologia ŝarĝo apenaŭ konata en la nacilingva teatra arto.

Ekde sia fondiĝo en la jaro 1958, la Bulgara Esperanto-Teatro orientiĝis preskaŭ ekskluzive al la realigado de almenaŭ tempe (se ne valore) klasikaj dramaj tekstoj. Malgraŭ tio, ke multaj kongresanoj, samkiel la recenzanto, pli volonte vidus modernajn dramajn tekstojn en la lingvo de la estonteco, per sia repertuaro BET montras altgradan konsideron de la gusto de plimulto de la kongresa publiko, kies alta mezaĝo ne aludas inklinon al avangardismo. Tamen, oni ja povas resti



ĉe klasikaj tekstoj kaj prezenti ilin en moderna teatra vesto, per kio oni povus gajni simpatiojn de ambaŭ partoj de la kongresa teatra publiko. Cetere, ion el tiaspeca inklino oni povis rimarki, kelkloke eĉ forte, ĉe la reĝisoro Pavlov, kies surscenigon de “La Barbiro de Seviljo” de Beaumarchais (Bomarŝe) ni spektis en Hamburgo. Tamen, la klasikeca arto de la plimulto el la aktoroj baris la modernecajn inklinojn de la reĝisoro kaj la dekoristino Raeva.

El la kompetenta geaktora trupo elstaris Peter Vuĉkov kiel Figaro, aparte en la unuaj du aktoj, kaj Kosta Conev kiel Don Bazilio, Rosina de Ĵorĵeta Ĉakarova des pli paliĝadis ju pli la komediaj intrigoj progresis. Kelkfoje en la komenco ŝi estis tute brile leĝera kaj petola, sed ŝi ne eltenis tiun ritmon ĝis la fino. Ankaŭ Anani Javaŝev kiel grafo Almaziva kaj d-ro Bartholo de Nikolai Binev spertis la saman fenomenon de la iom-post-ioma paliĝo. Ĝenerale, la ritmo de la tuta prezentaĵo spertis kuriozan inversiĝon, malan al la intriga ritmo. Se la publiko ankaŭ ĉe la fino varme aklamis la aktorojn, tio nur substrekas, ke la komenco efektive estis fortimpresa kaj promesplena, tiel, ke la entuziasmo de la spektantaro ne disponis pri sufiĉa tempo por ankaŭ mem ŝrumpi.

La ĉefa manko de la hamburga realigo de BET estis afero, kiun oni malfacile povas meti sur la konton de la bulgara teatra trupo, aŭ, se tamen jes, tiam kun pli ol multaj rezervoj. Temas pri la kvalito de la teatra lingvaĵo, pri tio kion oni ankaŭ en Esperanto povus nomi “dikcio”, tiel esenca por la komprenebleco de la lingvaĵo, kiu torentas desur la scenejo. Ne kulpas do BET pri tio, sed la ĉefa kulpulo estas la efemereco de la teatra arto en la Internacia Lingvo, la fakto, ke ankoraŭ neniu serioze studis la tuton de la teatraj realigoj en la historio de Esperanto, kun celo elkribri kolekton de “dikciaj” reguloj, kiujn devus severe atenti ĉiu aktivulo sur la teatra kampo ekde la aŭtoro de drama teksto ĝis la aktoro komunikanta tiun tekston al la spektantoj. Ĉe ni la situacio estas tia, ke verŝajne ĉiu reĝisoro kreas siajn proprajn “dikciajn” regulojn aŭ tute malatentas tiun esencan trajton de ĉiu bona teatra realigo. Tamen, por fari eĉ tion, por arbitre kreadi la regulojn de la necesa sonoro, la reĝisoro devas mem majstri la lingvon de la teatra realigo. Ŝajnas, ke tio ne estis la kazo de la reĝisoro Pavlov en Hamburgo. Kaj, pro tiu foresto de “dikcia” bazo, samkiel pro la fakto, ke pluraj aktoroj evidente ne regas la Internacian Lingvon, sed nur sukcesis parkeri siajn rolojn, la lingvaĵo venanta desur la hamburga scenejo estis ofte malfacile komprenebla. Al tia rezulto iome kontribuis ankaŭ la grandeco de la hamburga salono, kies ĉefa destino certe ne estis roli kiel teatra aŭditorio.

Restas tamen iom enigme kial BET decidigis surscenigi ĝuste tiun komedion de Beaumarchais, kies dramaj tekstoj estas ĉefe memorataj pro la fakto, ke ili servis kiel libreto-bazo por la konataj operoj de Rossini. Aliflanke, la flua traduko de Kiril Draĵev (polurita de Roger Bernard) sukcesis atentigi, ke la tekstoj de Beaumarchais estas iom tro frue forgesitaj,

des pli, ke en Hamburgo estis evidente, ke tiuj tekstoj restas bona bazo por ankoraŭ ĉiam ĝueblaj spektakloj. Konklude, BET faris sian eblon, investante admirinde grandan laboron en unu solan teatran realigon, kies fina rezulto estas grave malproportia al la faritaj streĉoj — maljustaĵo tiel kutima sur nia teatra kampo. Ĉiukaze, en la kalendaron de siaj realigoj, BET povas noti plian sukceson.

S. Milojević

EKSTERPROGRAMA TEATRA PREZENTAĴO:

Familia sofo

NEANONCITE en Hamburgo aperis konata aktora paro el Pollando kaj pretis proprariske aranĝi eksterprograman teatran prezentaĵon. Ke tio ne estis aventuro, pruvis tre baldaŭa elĉerpigo de la biletoj por la unua prezentaĵo kaj bezono ripeti la programon. Jen kelkaj impresoj de s-ino Emilija Lapenna:

Por teatro-amantoj estis aparta ĝuo partopreni en la libervola prezentaĵo de du profesiaj aktoroj, membroj de la Esperanto-teatro “Antoni Grabowski” el Pollando. Gracia, delikatstatura Kalina Pieńkiewicz kaj vireska, profundvoĉa Zbigniew Dobrzyński prezentis la nuntempan teatraĵon *Proksima nekonato*, kiun la pola aŭtoro Alexander Ścibor-Rylski titolis “komedio”, sed kiu en sia psikologia temevoluo estas pli trista ol humura.

La hamburga Kongres-centro disponigis al la Kongreso multajn tre bonajn salonojn, nur ĉi tiu teatraĵo okazis en nekonvena mezgranda ĉambro, sen podio, tiel, ke spektantoj el la malantaŭaj vicoj vidis nenion okazantan sur la sofo, kiu ludas gravan rolon en tiu kvazaŭa komedio pri geedziĝaj miskomprenoj.

La tradukinto en la 15an lingvon — Esperanto — estas Jerzy Grum, kies laboro bonvenigus kelkajn, vere nur kelkajn, plibonigojn, ĉar la teatra lingvo devas esti senriproĉa.

Festaj aranĝoj

INTERKONA VESPERO, Oficiala Balo, Oficiala Bankedo kaj Junulara Vespero estas tiaj kongresaj aranĝoj, ke oni malfacile povas imagi ilian malsukceson. Pro la konveneco de la disponeblaj ejoj, en Hamburgo ĉi tiuj aranĝoj eble estis eĉ pli sukcesaj ol en aliaj kongresoj. Cetere, la plej grandan kontribuon al la festa etoso en tiuj aranĝoj donis la muzika ensemblo Kvarteto Esperanto el Trenĉin, Ĉeĥoslovakio, kun sia vasta esperantlingva repertuaro. Ĉiuj festaj aranĝoj estis bone vizititaj, inkluzive de la Bankedo, kiun partoprenis preskaŭ 400 kongresanoj. La 29an de julio okazis akcepto en la Urbodomo, kiun partoprenis 300 kongresanoj.

Bona koncerto

KVANKAM la oficiala fermo de la Kongreso okazis nur la 3an de aŭgusto, la Internacia Arta Vespero, okazinta vendredon, la 2an de aŭgusto, estis tiu kongresa programero, kiu ankoraŭ sukcesis kunvenigi preskaŭ ĉiujn gekongresanojn, el kiuj multaj forveturis jam frumatene la morgaŭan tagon. La Internacia Arta Vespero do estis iasence la lasta granda aranĝo de la Kongreso, ĉar en la salono "Baghy", kie ĝi okazis, pli-malpli mankis nur la nova Estraro de UEA, kiu samtempe havis sian unuan kunsidon.

Internaciaj artaj vesperoj estas relative nova programe-ro en la programo de la Universalaj Kongresoj. La unua el ili okazis en la Londona Kongreso en 1971 kaj ili ne plu mankis en la programoj de la postaj kongresoj. Tamen, tiuj kongresaj programeroj preskaŭ komplete malsamis en la lastaj kvar kongresoj. Kaj, ĉefe malsamis ĝuste la baza koncepto de la aranĝo: en Londono ĝi estis tre sukcesa, sed iom nekohera koncerto de klasika kaj leĝera muziko; en Portland la aranĝo estis brile improvizita koktelo de voĉaj kaj instrumentaj programeroj, de deklamaĵoj, jodlado kaj dancoj; en la Beograda Kongreso, la Vespero havis klarajn trajtojn de koncerta aranĝo; en Hamburgo, ĉi tiu kongresa programero estis koncerto kun pli-malpli ĉiuj necesaj trajtoj de tia arta aranĝo.

Ankaŭ ĉi-jare la kongresa koncerto havis du necese distingeblajn partojn. En la antaŭpaŭza horo prezentigis kantistoj, kiuj interpretis klasikaĵojn, kaj post la paŭzo venis pli leĝeraj melodioj. Japana riz-rikolta danco estis prezentita en la komenco de la programo, fakte eĉ iamaniere antaŭ la komenco de la programo, antaŭ la oficiala malfermo de la Vespero. Simile, la slovaka Kvarteto Esperanto, samtiel malfacile kombinebla kun la ceteraj programeroj de la aranĝo, venis kiel brua fino de la programo. Dank'al tia kunmeto de la progra-mo, la Internacia Arta Vespero en Hamburgo sukcesis atingi la koherecon kaj koncertan solenecon, kiuj en la antaŭaj jaroj mankis al ĉi tiaj kongresaj aranĝoj. Ĉu ĉio ĉi signifas, ke la kongresaj programeroj de ĉi tiu speco post plurjara serĉado trovis difinitivan formon?

La kongresa publiko jam bone konas la bulgaran sopranon Maria Angelova, kiu sendube estis la plej brila voĉo ankaŭ en la hamburga koncerto. Kiel kuti-me, Angelova ankaŭ en Hamburgo interpretis tute novajn ariojn (Purcell — duo kun Margaret Hill —, Rahmanjinov, Schubert, Rossini) kaj tiel vastigis sian repertuaron en Esperanto, ke ŝi nun povus sola plenu-



La luksemburga kantistino Barbara Kohl estis sukcesa refreŝigo de la Internacia Arta Vespero en Hamburgo.

mi tutvesperan koncertan programon. Margaret Hill (Britio) ankaŭ ĉi-foje kontribuis per bukedo de popolkantoj kaj propraj melodioj por kiuj la tekstojn kaj tradukojn verkis William Auld. La bela voĉo kaj fajna muzika gusto de Margaret Hill ricevis gravan subtenon de ŝia edzo David, kiu flute akompanis plimulton de la programeroj. Bela refreŝigo de la hamburga koncerto estis la partopreno de la luksemburga soprano Barbara Kohl, kion oni dankas al IFEF kaj ĝia prezidanto Joachim Giessner. Elstaraj voĉkvalitoj kaj muzika eduko de Barbara Kohl bone reflektiĝis en iom kuraĝe kunmetita repertuaro de ŝiaj programeroj: Mozart, Koster, Gershwin, Lenoir, Loewe. Tamen, la kongresa publiko pleje aklamis la partoprenon de Ramona van Dalsem, nederlandanino, kiu jam dum jaroj sukcese verkas kaj komponas, ekskluzive por la movada merkato. Estas sendube ĝuste la simpleco de la tekstoj kaj melodioj de Ramona van Dalsem tio al kio ŝi ŝuldas siajn sukcesojn, ĝuste per tiu trajto de siaj kantoj ŝi sukcesas tuj kapti la intereson de la publiko, tuj rikolti aplaŭdojn. La du bulgaraj kantistoj — Jordan Karagjosov kaj Veselin Damjanov — plej ofte restis sub la nivelo de siaj kunagintinoj en la programo. Damjanov, kiu interpretis Bizet kaj rusan popolkanton, estis pli bona, kvankam malpli lerta ol Karagjosov. Cetere, Karagjosov, kiu prezentigis per arioj de Verdi kaj Wagner kaj per rusa kaj bulgara popolkantoj, en Hamburgo estis malfacile rekonebla por tiuj, kiuj memoras lian partoprenon en la antaŭaj kongresaj artaj aranĝoj. Sed tamen, tio kio mankis al Damjanov kaj Karagjosov estis ne unuavice la kvalito, sed la prepariteco: ili ambaŭ, samkiel Angelova, por la unua fojo renkontis sian pianistinon — nur duonan tagon antaŭ la koncerto kaj sukcesis havi nur unu solan provon, kiu ne povis doni pli bonajn rezultojn malgraŭ la kompetenteco de Gotlinde Sudau, kiu akompanis ne nur la bulgarajn partoprenintojn de la Vespero, sed ankaŭ s-inon Kohl. La program-vidado, kiun plenumis Vesna Staničić-Weide, estis eleganta kaj profesnivela.

Kolbaso sen mustardo

EN LA ĈEESTO de ĉ. 200 kongresanoj, prof. Waringhien en sia malferma alparolo de tiuj, kiuj venis aŭdi la rezultojn kaj la premiitajn verkojn en la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj, diris ankaŭ la jenan frazon: “Mondo sen poezio estas kiel kolbaso sen mustardo.” Eble ĝuste tiu amara admono de la prezidanto de la prijuĝa komisiono plej bele ilustras la malbelan konkursan rikolton ĉi-jare. Proklamante la rezultojn de la ĉi-jaraj Konkursoj, prof. Waringhien esprimis sian esperon, ke “foje ankaŭ la juna generacio komprenos” lian amaran frazon. Jen la rezultoj, kiuj inspiris la deklaron de la prezidanto de la Akademio:

Originala poezio

1. Nealjuĝita.
2. Nealjuĝita.
3. Egale al: Kuroda masayuki (Japanio) por “Supren penetris frost’”; Ueyama masao (Japanio) por “La Migranto”.

Tradukita poezio

1. Nealjuĝita.
2. Nealjuĝita.
3. Gaudenzio Pisoni (Italio) por “Al Silvja” de Giacomo Leopardi.

Originala prozo

1. Nealjuĝita.
2. Andreo Szabó (Hungario) por “Alaŭda adiaŭo”.
3. Endre Toth (Hungario) por “Aŭtune”.

Laŭda mencio: Mihail Ŝekerĝiev (Bulgario) por “Persisto”.

Originala dramo

1. Nealjuĝita.
2. Nealjuĝita.
3. D-ro Ludoviko Izák (Ĉeĥoslovakio) por “Sabro kaj purpuro”.

Nova talento (Pokalo Harabaĝiu)

Aldo de Giorgi (Italio) por “Viaj manoj” (originala poemo).

Malgraŭ tio, ke la Belartajn Konkursojn ĉi-jare eniris 90 (el proponitaj 118) verkoj de 48 aŭtoroj el 23 landoj, la nombro de nealjuĝitaj premioj estas same rekorda kiel pasintjare: en la tri ĉefaj konkursaj branĉoj (originalaj poezio kaj prozo kaj tradukita poezio) oni aljuĝis eĉ ne unu solan ĉefpremion, kaj nur la konkursa veterano Andreo Szabó sukcesis gajni la duan premion en la proza branĉo. Rerigardante la sorton de tiuj tri branĉoj — la originala dramo antaŭe lamiĝis eĉ pli multe ol nun — dum la lastaj dek jaroj, oni konstatas la jenon: En 1965 ĉiuj 9 premioj en la tri ĉefaj branĉoj estis aljuĝitaj, en 1966 mankis nur laŭreato de la proza ĉefpremio, samkiel en la tuj posta jaro; 1968 estis la lasta jaro kun ĉiuj premioj, en 1969 mankis unu, en 1970 kvin, en 1971 denove kvin, en 1972 ne estis aljuĝitaj tri premioj en la tri ĉefbranĉoj, kaj fine, en la pasinta kaj en ĉi tiu jaro, denove mankas po kvin laŭreatoj en tiuj tri branĉoj.

Io do okazas. Krizas la belarta kampo. Aŭ, ĉu la regularo ne plu taŭgas, ĉu la premioj ne plu allogas? Ankaŭ tiaj ĉi demandoj atendas novajn prijuĝan komisionon kaj sekretarion de la Belartaj Konkursoj, tiujn, kiuj transprenos la taskojn, kiuj dum tiom da jaroj estis sukcese plenumataj de prof. Waringhien, s-ro Roger Bernard kaj s-ino Emilija Lapenna, kiuj sekve de aliaj eventoj en Hamburgo rezignis pri siaj funkcioj.

Trista evoluo

KVANKAM la Oratora Konkurso de Hamburgo estis ĝustatempe kaj vaste reklamata ne nur en nia revuo, sed ankaŭ en *Kontakto* kaj aliaj eldonaĵoj de TEJO, la reago de junaj oratoroj estis pli ol malmultnombra: por tri premioj konkursis tri kandidatoj. La jubilean — 25an laŭvice — Oratoran Konkurson en Hamburgo partoprenis: P. Felsö (Hungario), kiu per sia parolado pri la temo “Kion volas la junularo en la Esperantomovado?” gajnis la duan premion; A. Bickel (Svislando), parolante pri la sama temo, ricevis la trian premion; G. King (Britio) konkursis per “Naciismo kaj internaciismo en mia lando”, sed restis senpremia. La ĵurio, kiu juĝis la arton de la junaj oratoroj, konsistis el Roger Bernard (prezidanto), I. Osibov kaj H. Tonkin. En la konkursa salono, kien, malgraŭ la frua mateno post la longa kaj laciga Oficiala Balo la antaŭan

vesperon, venis pli ol 200 ŝatantoj de la oratora arto, okazis ankaŭ io, kion oni poste plej ofte aludis kiel “nekredeblan incidenton”: La oratoraĵo de la svisa junulo Bickel enhavis frazon, kiun oni kvalifikis ofenda por la iniciatinto de la Oratora Konkurso prof. d-ro Ivo Lapenna, kies nomon portas la ĉefpremia pokalo de la Konkurso. Ankaŭ tio influis, ke la iniciatinto de la Konkurso kaj unu el la plej bonaj oratoroj en la historio de la Movado esprimu sian deziron, ke la “Pokalo Ivo Lapenna” ne plu rolu kiel premio en la Konkurso. Venontjare en Kopenhago oni observos tiun deziron, ĉar la nova Estraro de UEA en sia postkongresa kunsido decidis, ke la okazigo de la Konkurso estu provizore ĉesigita.

Trista evoluo de unu el la plej belaj iniciatoj en la kultura historio de la Movado. Ligante la sorton de la Oratora Konkurso al la krizo kiun spertas la Belartaj Konkursoj, oni kun tristo demandas sin: Ĉu la ŝtala frido de la tekniko senrevene voras la poeziajn trajtojn de la homa vivo?

Kunvenoj por ĉies gusto

AL LA UNIVERSALECO de la Universalaj Kongresoj grave kontribuas la diverseco kaj nombro de la fakaj kunvenoj, kiujn la Kongresoj entenas. Hamburgo ne estis escepto tiurilate, ĉar dum la kongresa semajno okazis minimume 40 tiaspecaj aranĝoj, ne kalkulante tiujn, kiuj estis organizitaj de UEA aŭ ĝia junulara sekcio. Ĉi tie ni klopodos menciigi nur la plej gravajn fakajn kunvenojn, supozante, ke pli amplekse pri ili raportos la koncernaj fakaj periodaĵoj.

Internacia Scienca Asocio Esperantista havis sian jaran ĉefkunvenon en Hamburgo. El la raporto pri la agado en la pasinta jaro videblas, ke la nombro de abonantoj de *Scienca Revuo* iom malkreskis pro perdo de abonoj en Sovet-Unio. Interesa novaĵo por la 35 ĉeestintoj estis la informo de prof. Peevski, ke Internacia Federacio de Sciencistoj en 1975 intencas ekeldoni sian revuon *Scienca Mondo* ankaŭ en Esperanto. Sekcio de ISAE, Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj, kiu en Hamburgo kunsidis sub la prezido de K. Válev, anoncis, ke ĝi preparas specialan numeron de *Scienca Revuo*. Nova sekcio de ISAE fariĝis Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj, kies fondkunveno (13 ĉeestintoj) elektis G. Cool (Svislando) prezidanto. La kunvenon de Universala Medicina Esperanto-Asocio ĉeestis 40 medicinistoj el 12 landoj. La jaran UMEA-Premion, kiun per sia donaco de tri milionoj da japanaj enoj ebligis la honora prezidanto de ĉi tiu faka organizaĵo, d-ro Ŝinoda (v. la aprilan numeron de nia revuo, p. 65), gajnis d-roj I. Hegyi kaj J. Török (ambaŭ el Hungario) per sia studo "Mezurado de la ekstera kranivolumeno ĉe la infanoj". Ĉar la Premio (arĝenta medalo kaj 200,— ned. gld.) estas unuafoje aljuĝita ĉi-jare, d-ro Ŝinoda honorigis la gajnintojn per speciala akcepto, pri kiu raportis du hamburgaj ĵurnaloj. Grupo de 20 medicinistoj vizitis la Tropikan Instituton Bernhard Nocht, kion organizis la hamburga veterinaro d-ro Sachs. Dum la Kongreso kunvenis ankaŭ Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (administrata kaj publika kunvenoj), kunlaborantoj de slipara kaj bilda vortaroj, la Akademio k.a.

Inter la plej multnombraj fakaj kunvenoj en Hamburgo estis tiu de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, kiun ĉeestis minimume 120 personoj. Oni traktis la rezoluciojn de la ĵus okazinta konferenco de ILEI en Sonnenberg (inter la 17a kaj 26a de julio), rilatojn de ILEI kun internaciaj organizaĵoj kaj ĝian kontribuon al la laborceloj de Unesko. Ornitologia Rondo Esperantlingva (40 ĉeestintoj) pridiskutis sian kvaronjaran revuon *La Mevo* kaj fondis studgrupojn pri abeloj kaj naturprotektado. En la kunveno de la asocio

Someraj Universitataj Kursoj, 15 ĉeestintoj traktis la ĝisnunajn spertojn en la efektivigo de la plursemajnaj universitatnivelaĵoj kursoj (kun Esperanto kiel laborlingvo), kies unua sesio okazis en 1972, la dua estis okazonta tuj post la 59a UK, kaj la tria sesio estas planata por la jaro 1976. Internacia Fervojista Esperanto-Federacio havis plurajn aranĝojn en la kadro de la Kongreso en Hamburgo: renkontiĝo kun funkciuloj de la Germana Fervojo, vizito al la kontenera haveno, faka prelego pri la modernigo de la fervojoj kaj — aparte substrekinde — fervojan giĉeton, kiu kun 6 deĵorantaj fervojistoj funkciis tra la tuta kongresa semajno. La fervojistajn aranĝojn partoprenis ĉ. 80 personoj. Kunvenis ankaŭ la asocio Monda Turismo, kiu kun 230 partoprenintoj fariĝis la plej multnombro vizitita fakkunveno dum la Kongreso. Rezolucio de tiu kunveno rekomendas la eldonon de pliaj lerniloj kaj informiloj por turistoj kaj pledas por pli firmaj ligoj kun vojaĝoficejoj kaj aliaj turismaj instancoj. Krome, dum la 59a UK kunvenis ankaŭ la fakaj asocioj de poŝtistoj (30 personoj), ĵurnalistoj (22 ĉeestintoj), aŭtomobilistoj (28 partoprenintoj), ŝakistoj, veteranoj, militrezistantoj (65 kongresanoj) kaj muzikistoj. La kongresa semajno estis rendevua tempo ankaŭ por aktivuloj de Eŭropa Esperanto-Centro, Skolta Esperanto-Ligo, Institucio Hodler '68 kaj Mondpaca Esperantista Movado (70 ĉeestintoj). Interreligian kunvenon partoprenis 120 kongresanoj, kaj tiu de Oomoto allogis 150 aŭskultintojn. Kunvenis ankaŭ kvakeroj, kristanoj, katolikoj, Bahá'í Esperanto-Ligo kaj kelkaj aliaj fakaj kaj religiaj organizaĵoj.

Satelitaj aranĝoj

LA 42a INTERNACIA Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazis samtempe kun la 59a UK en la Kongresa Centro. En ĝia inaŭguro parolis ankaŭ la senatano, s-ro Ernst Weiss, estro de la Oficejo por la Laboro kaj Sociaj Aferoj de Hamburgo. En sia parolado, la senatano Weiss atribuis al la Universala Kongreso "grandan progreseman signifon" kaj deklaris sian simpatiecon por la klopodoj enkonduki Esperanton en lernejojn.

LA 14an INTERNACIAN Infanan Kongreseton partoprenis 17 infanoj el 6 landoj. La aranĝo okazis en la feriodomo por lernejoj Hoisbüttel apud Hamburgo. Pri la programo de la Kongreseto kaj bonfarto de ĝiaj partoprenintoj zorgis teamo de kvar edukistinoj: s-ino Blasius (FR Germanio), S-ino Hegedüs (Hungario), f-ino Aihara (Japanio) kaj s-ino Moritz (Hispanio).

LA OFICIALA POSTKONGRESO en Kronach allogis 136 partoprenintojn el 19 landoj. Unu el malmultaj laboraj aranĝoj de la Postkongreso — publika diskut-vespero — allogis surprize grandan nombron da lokaj aŭtoritatuloj. Pri la organiza flanko de la Postkongreso, kiun plenumis la loka turisma oficejo, oni aŭdis nur komplimentojn.

JUNULARA TAGO EN HAMBURGO:

Nur laŭnome junulara

SE ONI ANKAŬ ESTONTE VOLAS konservi la “Junularan Tagon” en la programoj de la Universalaj Kongresoj, necesas fari grandajn klopodojn por ke ĝi estu pli junulara, ol okazis en kelkaj lastatempaj UK, inkluzive de Hamburgo. En la 59a UK, la 30an de julio (kio estis la “Junulara Tago”), el 23 programeroj de tiu kongresa tago, maksimume kvin estis junularaj, almenaŭ laŭ la nomo aŭ parto de la traktita temaro. Ne necesas, nek cetere eblas, havi pliajn, sed certe jes aliajn, alispecajn, pli allogajn, pli vervajn, pli junecajn kaj junularajn aranĝojn en tiaspeca kongresa tago. Tio daŭre restas afero, kiun devus trakti, ne nur la LKK-ano komisiita pri junularaj aranĝoj, sed unuavice kaj ĉefe la Estraro aŭ alia kompetenta organo de TEJO.

Nu tamen, kio okazis en la kadro de la “Junulara Tago” en Hamburgo? Jen: la Oratora Konkurso, kies magrecon ni traktas aliloke en ĉi tiu numero; administra kunveno de TEJO, pri kiu ni ne aŭdis ion raportindan; publika debato de TEJO, kiun ni traktas ĉi-sube, kaj la Junulara Vespero, kiu samtiel bele estis povinta nomiĝi “la dua kongresa balo”, ĉar ĝi estis nur plia (tamen ne superflua) dancvespero.

La publikan debaton de TEJO gvidis d-ro J. Pool, kaj en ĝia kadro C. Nourmont prezentis la pasintjaran agadon de la junulara sekcio de UEA. Ŝi aparte substreki la aktivecon de TEJO sur la kampoj kultura (seminarioj de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj, *Kontakto*) kaj tiu de eksteraj rilatoj (la agado de KER, Eŭropa Junulara Fonduso, orienteŭropaj asocioj, minoritatoj). En la diskuto, kiu sekvis, oni tuŝis jenajn temojn: pli bona kunlaboro inter TEJO kaj Skolta Esperantista Ligo, ĝisdatigo de *Kontakto*, agado en studentaj medioj, Internaciaj Junularaj Kongresoj de



TEJO, seminarioj de KER, la 30a IJK en Münster, aliĝkondiĉoj de landaj sekcioj al TEJO, rilatoj kun neesperantistaj organizaĵoj. Oni forte emfazis, ke la rilatado de TEJO kun neesperantistaj junularaj organizaĵoj de difinita politika orientiĝo, ne signifas, ke ankaŭ la junulara sekcio de UEA alprenas samajn politikajn starpunktojn, male, oni denove substreki la neŭtralecon de TEJO kaj ĝian integrecon kun UEA.

Unu el la plej belaj elpaŝoj de TEJO en la 59a UK estis la ekspozicio de pluraj varbaj kaj informaj afiŝoj, kiuj en kompetenta grafika prizorgo celis prezenti la aktivecon kaj ĉeftraĵojn de la junulara sekcio de UEA. Bedaŭrinde, tiuj belaj afiŝoj estus povintaj havi iun pli belan, pli luman lokon en la kongresejo, por tiamaniere noti pli bonan efikon.

SEMINARIO “LINGVO KAJ SOCIO”:

KER estas modelo

SAMTEMPE kun la 30a IJK, inter la 3a kaj 10a de aŭgusto, en Münster okazis la Seminario “Lingvo kaj socio”, kiun organizis la Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO. La Seminarion partoprenis 12 reprezentantoj de neesperantistaj junularaj organizaĵoj kaj 21 esperantistoj. La ĉefaj demandoj pri kiuj okupiĝis la Seminario estis rilatoj inter la lingvo kaj ekonomio kaj ekzameno de diversaj politikaj sistemoj por konstati, kiu el ili ofertas la plej bonajn kondiĉojn por pli justa traktado de la subpremataj grupoj (rasoj, etnoj, klasoj ktp).

En la kadro de la Seminario estis prezentitaj referaĵoj de: prof. Jan Knappert (La ŝtato kaj la lingvoj en ĝi parolataj; Lingvaj problemoj de novaj nacioj; Influo de lingvo al ekonomio en Afriko), Hans Bakker (Kiel lingvo influas sociajn strukturojn?), Renato Corsetti kaj Mauro La Torre (Lingvaj kaj sociaj grupoj), Giorgio Cardona (Lingvistoj kaj lingvopolitiko), Lorenz Kerner (La nuna pozicio de la germana minoritato en Hungario) kaj Senad Čolić (Pozicio de lingvoj en la kunteksto de la socia evoluo de Jugoslavio). Kiel labormaterialo estis disponeblaj ses pliaj referaĵoj en kvar lingvoj. Unu el la ĉefaj konkludoj de la tutsemajna intensa traktado de la seminaria temo estis, ke la lingva libereco ne estas apartigebla de la politika libereco kaj, sekve, ankaŭ ne de aliaj trajtoj de la socio interne de difinita lando aŭ en la internaciaj kadroj. Laŭ ĝenerala opinio de la partoprenintoj kaj organizintoj de la Seminario, necesas ankaŭ estonte aranĝi similajn studsemajnojn.

D-rino Flora Szabó-Felső, la prezidantino de TEJO, havis laborstreĉan someron ĉi-jare. Al siaj ĝisnunaj funkcioj ŝi aldonis ankaŭ tiun en la nova Estraro de UEA.

Bonege improvizita

La bela afero kun la Internaciaj Junularaj Kongresoj (ekde ĉi tiu jaro: Konferencoj) estas, ke ili neniel minacas instituciigi, ke ĉiu el ili estas io aparta, io nova, neniel simila al la jam okazintaj eventoj de tiu tipo. Kvankam aranĝataj ĉiujare (ĵus antaŭ aŭ tuj post la Universalaj Kongresoj, kutime en la sama lando), ĉi tiuj jaraj ĉefeventoj de la junulara sekcio de UEA konservas nenian kontinuecon en sia organiza skemo, ne laste ankaŭ pro la kompleta foresto de profesia prizorgo de la preparlaboroj. Tia ĉi sinteno de pli-malpli kompleta ignorado de la antaŭaj spertoj, rezultigas, ne bonan organizon, sed bonan improvizon de iu IJK. La ĉi-jara, la 30a IJK en Münster (FR Germanio) estis bonege improvizita. Jen raporto, draste koncizigita kaj rearanĝita, de nia juna belga kunlaboranto Eric Nemes.

INTER la 3a kaj 10a de aŭgusto, 250 gejunuloj el 31 landoj (inter ili 12 neesperantistoj) renkontiĝis en Münster por labori kaj amuziĝi en la kadro de la 30a Internacia Junulara Konferenco de TEJO. Ili ĉiuj loĝis en kvin diversaj kvartaloj de la urbo, en 16 loze dis-semitaj domoj. Tio tamen ne malhelpis la Estraron de TEJO konstati, ke la LKK prizorgis, ke ĉiu partoprenanto de la Konferenco “manĝu, dormu kaj laboru en taŭga atmosfero”.


Kvankam la Konferenco komenciĝis jam sabaton, la 3an de aŭgusto, kaj la morgaŭa dimanĉo estis plen-labora tago, la oficiala malfermo de la 30a IJK okazis nur lundon, la 5an de aŭgusto. Oni aparte rimarkis la salutvortojn de Karl Herfurt, prezidanto de la “labor-rondo de centraj junularaj asocioj” (AzJ), kiu en Esperanto kore bonvenigis la partoprenantojn de la Konferenco. Poste oni aŭdis interesan prelegon de prof. H. Frank (samtiel en Esperanto), kiu parolis pri la temo “Lingvopolitiko por Eŭropo”. Laŭ prof. Frank, unuiĝinta Eŭropo estos federacio de naŭ landoj, en kiuj estas parolataj sep lingvoj. Ĉiu el tiuj popoloj povas helpi, malhelpi aŭ indiferente trakti sian propran lingvon en la estonta federacio, depende de la karaktero de sia lingvopolitiko. Prof. Frank asertis, ke ĉiu el la tri bazaj politikaj tendencoj (dekstra, maldekstra kaj liberala, kiujn li prezentis grafike en formo de triangulo) devus evoluigi propran lingvopolitikon, ĉar indiferenta traktado de la afero kontraŭas ĉies interesojn. Prudenta eŭropa lingvopolitiko devus solvi la problemon ekonomie kaj racie, konsiderante la ŝovinismon unuflanke, kaj la neceson konservi diversajn kulturajn heredaĵojn aliflanke. Atingenda celo estas, diris prof. Frank, elekti planlingvon kaj lerni ĝin antaŭ ol ekstudi aliajn fremdlingvojn. Laŭ prof. Frank, necesas evoluigi Esperanton kiel komunikilon, mondpercepton kaj ŝat-okupon, sed nepre ne miksi tiujn tri aferojn. En la kadro de sia laborgrupo — la Konferenco ĉefe funkciis pere de laborgrupoj — prof. Frank traktis la temon “Cibernetiko kaj Esperanto-instruado”.

Alia laborgrupo, gvidita de Renée Triolle, okupiĝis pri “Problemoj de fremdlingva instruado”. Oni emfazis, ke la ĉefa demando estas kiamaniere ligi la novajn rezultojn de la moderna lingvistiko kun la praktiko de la instruado de fremdaj lingvoj. Ĝenerale, oni ĝis nun tiurilate studis nur la spertojn en la instruado de la naciaj lingvoj, pro kio senpacience estas atendataj la rezultoj de la kvinlanda eksperimento lige al la Maribora lerneja konferenco.

Paul Peeraerts gvidis laborgrupon, kies temo estis “elokventeco” kaj kiu alportis eĉ praktikajn rezultojn. Post teoria kurso pri la voĉo, spirtekniko, gestoj, artikulado kaj mimiko, ĉiu partopreninto preparis paroladon kaj oni bone povis rimarki progreson en la oratoraj kapabloj. La laborgrupo aparte ekzercis specialajn paroladojn: enkondukajn, dankajn, gratulajn, festajn, funebrajn.

En la kadro de la Konferenco funkciis ankaŭ la labor-grupoj, kiuj okupiĝis pri jenaj temoj: “Edukado al paco”; “Kontraŭaŭtoritata edukado”; “Grupdinamika studrondo” kaj “Edukado per la natursciencoj”. Tamen, raportoj aparte pri ĉiu el ili superus la disponeblan spacon en ĉi tiu numero de la revuo. Cetere, *Kontakto*, la revuo de TEJO, tre verŝajne dediĉos iom pli da atento al la labora flanko de la 30a IJK.

Al la distra flanko de la Konferenco kontribuis la ĉeĥoslovaka muzika ensemblo Kvarteto Esperanto kaj la pola aktora paro Pieńkiewicz/Dobrzyński, kiu brile ludis la teatraĵon de Ścibor-Rylski *Proksima nekonato*. Okazis ankaŭ la tradiciaĵo en ĉiuj aranĝoj de Germana Esperanto-Junularo — la nokta migrado, vizitoj al la urbo (kun akcepto en la urbodomo), konatiĝo kun la loka universitata biblioteko, moderna (ankaŭ konstruata) hospitalo, komputila kalkulcentro, fervoja faklernejo ktp. Aparte interesa montriĝis la prezento de filmo pri la junulara kongreso en Tervueren, en 1939. La lastan tagon de la Konferenco oni ekskursis al Tecklenburg kaj Burgsteinfurt kaj tie partoprenis



La 30a Internacia Junulara Konferenco de TEJO en Münster allogis pli ol 250 partoprenantojn.

gajan folkloran “ŝicen-feston”, kiu finiĝis per “ŝicen-balo”. Kvankam improvizita lastmomente (pro subita pluvo, kiu malebligis alian planitan aranĝon), la “Kontraŭkokakoliga Vespero” iasence fariĝis simbola ĉefaranĝo de la 30a IJK. Oni unue gustumis japanan, italan, jugoslavian kaj indonezian menuojn, kiujn preparis partoprenintoj el tiuj landoj, kaj poste faris muzikan promenon tra la mondo, evitante “kokakolan kulturon”, samkiel “kokakolajn vestaĵojn, trinkaĵojn kaj pensmanieron”, kiuj estis severe malpermesitaj dum la vespero. Cetere, bona enkonduko al la sukceso de tiu hazarda programero estis antaŭaj vizitoj al la t.n. “bovina kvartalo” de Münster, kie preskaŭ ĉiu domo estas nur alia gastejo.

KUNSIDOJ DE LA KOMITATO DE TEJO EN MÜNSTER:

Sen drameco

LA KOMITATKUNSIDOJ de TEJO apartenas al la kutimaj, kelkfoje iel distraĵ, sed plejofte tedaj programeroj de IJK. En Münster oni povis havi la impreson, ke ili ludis malpli gravan rolon ol kutime: la unua (sabaton posttagmeze) ne okazis pro manko de kvorumo, alia (merkredon vespere) devis frue finiĝi pro la fiksitaj veturhoroj de la IJK-aŭtobusoj. Mi ne ricevis la impreson, ke iu bedaŭris la fruan finon, kvankam multaj tiamaniere malaperis antaŭ la diskonigo de la elektorezulto.

Kiel kutime, do okazis elekto de nova Estraro. Ĝi denove por unu jaro havas la taskon vivteni la organizeton, kiu pro manko de financaj kaj administraj rimedoj fakte povas mem fari nur tiom kiom laboras la unuopaj estraranoj. Feliĉe, almenaŭ kelkaj landaj sekcioj havas pli da ebloj.

Pri la laboro de TEJO plue respondecos la ĝisnuna prezidanto Flora Szabó-Felső. Ŝi, krome, ĉefe okupi-

ĝos pri statutaj kaj kunordigaj aferoj. La gvidantino de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj, Rada Gavrilović, eniris la estraron kiel vicprezidanto. En tiu ofico ŝi devos nur daŭrigi sian ĝisnunan duonprofesian laboron en la Amsterdama KER-oficejo. Vicprezidanto fariĝis ankaŭ Ulrich Brandenburg, kiu ĉefe respondecis pri la IJK en Münster. Krom parton de la ĝenerala kunordigado, li transprenis la fakojn “studoj kaj esploroj” kaj “edukado de gvidantoj”. Pri la Komitato, membraro, landaj sekcioj, administrado kaj alia laboro okupiĝos Brunetto Casini kiel ĝenerala sekretario. La kaso restas ĉe Jeanne-Marie Liouville-Cash, kiu ankaŭ daŭrigos sian laboron sur la varba kampo. Klaus Schubert fariĝis estrarano pri kongresoj: loĝante en Hamburgo li ofte havos okazon viziti Danlandon, la supozeblan lokon de la venonta IJK. Pri eldonaĵoj respondecas en la nova Estraro Paul Peeraerts, konata ĉefe kiel eldonanto de “Koncize”. Du estraranoj dediĉu sin al regiona agado: Juan Azcuénaga Vierna kaj, ĉar regionoj ankaŭ ekzistas ĉe niaj antipodoj, Stefan MacGill el Nov-Zelando. Angel Todorov el Bulgario transprenis servojn, junularajn delegitojn, studentan kaj lernejan agadon kaj prizorgon de transpagaj aferoj. Entute do dekpersona Estraro, al kiu oni povas deziri sukcesan laboron kaj, kiel necesan antaŭkondiĉon, subtenon ankaŭ flanke de UEA, kiu ĝis nun evidente mankis, por ne uzi pli krudan esprimon.

Almenaŭ la nova Estraro ne plu bezonos dum jaroj cerbumi kion fari. Se iu estrarano tion ne scias, li nur malfermu la koncernan paragrafon de la laborplano, kaj li trovos respondojn al preskaŭ ĉiuj brulaj problemoj de nia Movado. Ekzemple, ke “TEJO disvastigas kaj propagandas la lingvon Esperanto”, “zorge preparas la temojn de la IJK kaj aliaj renkontiĝoj” kaj, se restos tempo, “aktive partoprenas en la kunlaboro inter Unesko kaj UEA”.

Ĉiuj povas gratuli al si, ke la ellaborado de laborplano, tiu malfacila tasko kiu dum la pasintaj jaroj postulis niajn fortojn, estas sukcese finita. Kaj kun freŝaj fortoj ni povas transiri al same grava projekto: la ellaboro de nova statuto, kiu estu preta ĝis 1975. Ni esperu, ke la tempo sufiĉos, ke eble restos okazo por aliaj agadoj. Se necesas al iu deziri sukceson, tiam certe al la danaj geamikoj, kiuj surprize staras antaŭ la tasko organizi la venontan IJK. Eble foje sukcesos, ke ankaŭ la TEJO-estraro partoprenu en tiu laboro; se jes, ĝi jam pro tio meritos favoran kritikon.

U. B.

ALMENAŬ UNU TRAJTO DE LA 59a UNIVERSALA KONGRESO RESTAS NETUŜITA EN ĈI TIU NUMERO DE LA REVUO. TEMAS PRI LA EKSTERA, ĈEFE GAZETARA EĤO DE LA KONGRESO. AL TIU TEMO NI DEDIĈOS APARTAN SPACON EN LA OKTOBRA NUMERO.

Kongreseroj . . .

TREZORA VERKO

Dum la Interkona Vespero, pluraj interesiĝantoj avide foliumis trezoran verkon — la represon de la nuna volumo de *Literatura Mondo*. La ofsetado estis finita malmultajn tagojn antaŭ la Kongreso, kaj nur lastmomente oni sukcesis bindigi du ekzemplerojn, por ke prof. T. Sakata kaj s-ro N. Soĵi, la iniciatintoj de la represo, povu ilin kunporti el Japanio al Eŭropo. Kiel ni jam informis (v. la julian/aŭgustan numeron de nia revuo, p.126), entute aperos 6 volumoj, kiuj kostas 300 guldenojn.

FAKA BICIKLADO

La Kongresa Gazetara Servo ricevis foje neniam, foje utilajn, kaj foje tute ekstertemajn raportojn pri la kongresaj eventoj. Al tiu lasta kategorio apartenas ankaŭ la jenaj informoj, entenataj en raporto pri faka kunsido: “Sanjo ĵus forlasis flegistinan deĵoron ĉe hejmo por gemaljunuloj en Wil, Svislando, kaj per biciklo trapasis Aŭstrujon, Ĉeĥoslovakujon kaj Germanujon por atingi la UEA-Kongreson je dimanĉo.”

SUSPEKTINDE

Verŝajne malpli por konsoli, ol por malstreĉi la diskuton, dum la Unua Ĝenerala Kunveno de UEA, traktanta i.a. la financajn malfacilaĵojn de la Asocio, s-ro Mark Starr intervenis per la vortoj: “En Usono, organizo, kiu ne konas deficiton, estas iom suspektinda.”

SCIENCA KONTRIBUO

Post prelego en la ĉi-jara sesio de ISU, kiam oni invitis al diskuto, iu sinjoro leviĝis kaj iris al la podio. Ĉiuj atendis, ke li faros ian kontributon al la traktita scienca temo. Sed, montriĝis, ke li havis tute alispecajn zorgojn: alpaŝante la preleginton, li kun rideto laŭte deklaris: “Estimata profesoro, via insigno estas renversita!”

AMUZO FURORIS

En la kongresa librostando de Ludwig Pickel, *Amuzaj dialogoj en Esperanto* de A. Lienhardt estis la plej granda vendosukceso. Simile furore disvendiĝis la nova “bervalajo” de

Louis Beaucaire kaj la verkoj de Jean Forge. Apud tiuj facilaj legaĵoj, la aĉetemon de la kongresanoj logis ankaŭ vortaroj, inter kiuj ĉefe *Plena Ilustrita Vortaro* kaj la nova *Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro*.

KOMITATA SLANGO

Kongresano el la Fora Oriento, kiu jam dekon da jaroj en sia lando gvidas Esperanto-kursojn kaj ĝenerale montras altgradan lingvan kompetentecon, dum la kunsidoj de la Komitato de UEA en Hamburgo unike spertis la vivantecon de Esperanto. Temas pri esprimoj, kiujn li ja konis kaj instruis, sed li neniam aŭdis, ke oni uzas ilin en la praktiko. “Unue mi dubis miajn orelojn”, li klarigas, menciante, ke la dignaj personoj en la Komitato, sen ŝanĝi la mienon, meze de flua, eleganta parolo, uzis la por li kvazaŭ tabuajn vortojn: fiago, kalumnio, ŝtelo, trompo, fia, misfaro ktp.

LA HIMNO-SAVANTO

Kiel kutime en kelkaj lastaj jaroj, s-ro Jo Haazen (sur la foto), urba kariljonisto de Antverpeno, ankaŭ en Hamburgo “savis” per sia direkta-



do la komunan kantadon de la himno. Krome, dum la Kongreso s-ro Haazen prezentis tri unuhorajn kariljonkoncertojn.

UNIFORMOJ

Verŝajne neniam antaŭe okazis, ke la tuta LKK, por necese rekonebli en la kongresa homamaso, kiel en Hamburgo havis elegantajn malhelbluajn uniformojn. LKK-anoj verŝajne koleris kontraŭ kelkaj aliaj kongresanoj, kiuj ofte aperis vestitaj laŭ la oficiala LKK-modo.

LERNEMA MOŬTO

Inter la plej diligentaj partoprenintoj de la Konversacia Rondo (por komencantoj), kiun sukcese gvidis Tacuo Huĝimoto, troviĝis ankaŭ s-ro D.S. Choi, eksministro pri eksteraj aferoj de Suda Koreo, oficinta ankaŭ kiel korea ambasadoro en Bonn. Eksgeneralo, li estis en aprilo 1967 elektita ĉefo de Ĉondokjo, potenca religi-politika movado, kiu ludis gravan rolon en la korea historio de la pasintaj cent jaroj. Por vidi kion lia esperantistiĝo signifas por la korea Esperanto-movado, necesas ankoraŭ atendi, kvankam lia influo ŝajnas jam konsiderinda, des pli, ke li jam estas prezidanto de Korea Esperanto-Instituto. Onidire, antaŭ la Kongreso s-ro Choi partoprenis la kurson de L. Friis en Elsinoro (Danlando).

LA SENZORGA TAGO

La kongresa semajno ne abundis je sunaj tagoj. Tamen, kvazaŭ mendite, la tradicia ekskurso tago (la 1-an de aŭgusto) estis la plej belvetera kaj permesis, ke la tuta kongresanaro ĝuu la ekskursojn al Heiligenhafen (aŭtobuse) aŭ Glückstadt (ŝipe). Oni rimarkis, ke tiun tagon en la kongresejo estis videblaj nur komitatanoj de UEA, kvankam ĝuste ili pleje bezonis senzorgan ripoztagon.

REFOJE “ANGOROJ”

La kongresa programo ĉi-jare proponis du filmvesperojn, el kiuj la unua estis dediĉita al novaj dokumentaj filmoj el Sovet-Unio, Norvegio, Svislando kaj Aŭstralio, kaj la dua al la tutvespera filmo de J.L. Mahé “Angoroj”. La kvar informaj filmoj estis en bona Esperanto, escepte de la svisa, kiu havis franclingvan parolon. La filmo de J.L. Mahé, produktita antaŭ deko da jaroj, originale en Esperanto, logis ĉ. 400 kongresanojn. Ĝi nun estas ankoraŭ rigardebla kiel interesa kuriozaĵo.

LA REVUA FOTISTO

Kongresanoj ne povis ne rimarki japanan, bambu-forman sinjoron, kiu dum la tuta kongresa semajno trenis tra la kongresaj salonoj: tri fotilojn, du foto-fulmilojn, plurdekon da uzitaj kaj neuzitaj filmoj kaj sandviĉon por longaj komitataj kunsidoj. Se vi dum iu el la kongresaj aranĝoj rimarkis ion moviĝi sub via seĝo, tio certe estis li — Tacuo Huĝimoto —, al kiu ni dankas ĉiujn kongresajn fotojn en ĉi tiu numero de la revuo.

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.


Éva kaj Bernard Golden, hungara-usona esperantista geedza paro de Veszprém, Hungarujo, anoncas la naskiĝon de sia filo, Daniel Lariko, la 4an de aŭgusto.

Esperantina V. Konstantinova de Sofio, Bulgario, informas siajn korespondamikojn, ke la 14an de julio 1974 ŝi edziniĝis al dipl. ing. Boĵidar Daskalov de Sofio.

Poŝtmarkojn argentinajn kaj Esperantajn interŝanĝas kaj vendas — Luvic Schiav, Castro Barros 1433, Buenos Aires, Argentino.

Individue aŭ grupe deziras korespondi kun geskoltoj: Anne, Jane, Clare, Katie Baillie-Smith: Cumnock Terrace, Castle Cary, Somerset, Britujo.

Gekorespondantojn serĉas komencaj kursanoj. Bv. skribi al: M. Raposo, Caixa Postal 872, Lourenço Marques, Mozambiko. Respondo certa.



Antaŭa oficisto de UEA serĉas interesan laboron en iu ajn lando. Usona nacieco. Lingvoj: angla, Esperanto, hispana, iomete franca. Respondu al Laurin Lewis ĉe UEA.

Korespondemuloj! Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian foton. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por senpaga aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

La lego-libro por lernemuloj kaj ridemuloj: AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO. 20 dialogoj, 20 tutpaĝaj humuraj ilustraĵoj, 2000 konversaciaj frazoj, parol-turnoj, demandoj kaj respondoj. Prezo: 4,50 guldonoj (por Nederlando: 4,68 gld.); sendo-kostoj: 10%. Mendu ĉe via landa libro-servo aŭ rekte ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002. Poŝta ĉek-konto: 37 89 64.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

La aŭtunaj tagoj de finnaj esperantistoj okazos je la 19-20 de oktobro en mia urbeto. Tutmonde mi petas poŝtkartojn por montri la vastecon de la Esperanto-familio al miaj geurbanoj. Rajja Pehkonen, Porrassalmenk 43 B 32, SF-50100 Mikkeli 10, Finnlando.

ESPERANTO ESTAS SCIENCA VERKO, SCIENCE ANALIZEBLA.

Legu "Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto", de L. Mimó.
Prezo 17,50 guldonoj.

Anonco en esperanto

atingas pli da legantoj en pli da landoj,
ol anonco en iu ajn alia Esperanta revuo.

Tarifo:

anonco tutpaĝa = 375,— gld.
anonco duonpaĝa = 200,— gld.
anonco kvaronpaĝa = 110,— gld.
anonco okonpaĝa = 65,— gld.
anonco deksekonpaĝa = 40,— gld.
Rabato por senŝanĝa ripeto: 20%.


KOMERCA UZADO DE ESPERANTO

Rilate al ĵurnalisma projekto, ni serĉas informojn pri la komerca uzado de Esperanto. Ni bezonas plenajn detalojn pri specifaj kazoj, precipe nomojn kaj adresojn de unuopaj firmoj.

Respondu bonvole al S-ro A.Laverick, Fakto XX, Brita Esperanto-Asocio, London W11 4UF, Britujo.

MUZIKA SES—SES BULTENO

Kvaronjare en Esperanto kaj la angla.



Jarabono \$4.00, studentoj kaj pensiuloj \$3.00. Poŝtkesto 207, Purdin, Mo.64674
Usono

Lernantoj! Komencantoj! Kursgvidantoj!
LEGU VIAN GAZETON –
LA INTERNACIAN LERNEJAN
ESPERANTO-REVUON

JUNA AMIKO

Aperas 3-foje jare: septembro, januaro, aprilo
 Jarabono: 4,- guldenoj.

JUNA AMIKO prezentas diversajn popolojn,
 mondfamajn artistojn, scienculojn, unikajn
 produktojn de la homa menso,
 interesaĵojn el sciencoj kaj tekniko;

JUNA AMIKO amuzas per kantoj, ludoj,
 enigmoj, ŝercoj, rakontoj, fabloj, versaĵoj;

JUNA AMIKO informas pri lernejaj grupoj,
 internaciaj kluboj, korespond-anoncoj,
 gravaj okazaĵoj;

JUNA AMIKO organizas konkursojn,
 kontaktojn inter lernejanoj.

JUNA AMIKO uzas 1000 vortradikojn,
 simplan vorto- kaj frazokonstruon.

JUNA AMIKO estas riĉe ilustrita per fotoj,
 desegnaĵoj, karikaturaj.

Amplekso: 24 paĝoj. Preso: dukolora.

Eldonejo: Hungara Esperanto-Asocio.

Redakcio: 28 personoj el 17 landoj.

Ĉu vi parolas tendare?



2a eldono
 broŝurita
 ilustrita
 96 paĝoj
 21x15cm

de Renato Corsetti kaj Mauro La Torre.
 Rektametoda lernolibro de TEJO por kursoj en
 labortendaroj. Prezo: 2,50 (por Nederlando
 2,60) gld. plus sendokostoj 10%.
 Rabato por kvantaj mendoj: 1/3 ekde 3 ekz.

Represo de LITERATURA MONDO

TREZOREJO DE LA ESPERANTA KULTURO – DENOVE ESTAS HAVEBLA!

”Kompleto de Literatura Mondo estas absolute necesa
 posedaĵo de ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la historio de nia
 lingvo, aŭ de nia literaturo, kaj de ĉiuj, kiuj volas posedi
 la tradician kulturon de Esperanto.” (W. Auld)

- Dum tri periodoj, 1922-26, 1931-38, 1947-49, aperis en Budapeŝto, sub la redakto de Kalocsay, Baghy k.a., entute 3 148 grandformataj paĝoj de Literatura Mondo, kun la originalaj kaj tradukaj kontribuaĵoj de la kremo de la Esperantaj verkistoj.
 - Preskaŭ nur laŭnome konata al la postmilita generacio, la iama centra organo de la Esperanta kulturo estas nun denove havebla – en fidela fotorepreso prizorgita en Japanio.
 - Jam aperis la unua volumo! Kvin pliaj sekvos – ĉiuj en luksa tola bindo. La sesa volumo, kun plena indekso, aperos en somero 1975. Mendintoj ricevos unuopajn volumojn tuj post ilia eldoniĝo. La unua volumo estas tuj liverebla.
- Eldonas: Kooperativo por Represo de LM, Tokio.

MENDU ĈE: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.
 Prezo: 300,- (por Nederlando 312,-) guldenoj, plus sendokostoj 10 procentoj. Por registrita sendo aldonu 1,75 gld. por ĉiu volumo. Pagante per banko aldonu 5,- gld. por bankkostoj.

